

trimestriel
2ème trimestre
2011

LA INFORMILO

N° 154
30 juin
2011


l'espéranto



la langue de l'amitié
sans frontières



esperanto



la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj

ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale
ESPERANTO
regroupant
les départements
Meurthe-et-Moselle (54)
Meuse (55)
Moselle (57)
Bas-Rhin (67)
Haut-Rhin (68)
Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture
« Philippe Desforges »
27, Rue de la République
FR-54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO
annuel / jara
14 €
eksterlando
18 €



reproduction d'une huile sur toile de Raoul Giordan 1997

esperanto
France-Est

Elle n'est pas inélucltable




Il est évident que nos lecteurs non francophones seront frustrés de ne pouvoir apprécier le contenu de la dernière publication que met à la disposition du public sensible au problème de la communication internationale, André CHERPILLOD, bien connu en "espérantie", auteur prolifique s'il en est d'une série d'ouvrages didactiques sur le thème des langues.

Près de cinquante sont d'ailleurs cités dans ce manuel, véritable argumentaire exhaustif qui montre que la "malédiction de Babel" n'est pas inélucltable.

Un compte-rendu critique de cette publication dans ce bulletin.

URGENT ! ... Rédaction et envoi de votre fiche d'adhésion à notre grande rencontre d'automne -lernfesto- à VILLINGEN (DE)

Espéranto France-Est	 <i>France-Est</i>	Orient-Franca Esperanto-Asocio.
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO
Rédaction: Redaktoro:	PoI DENIS, 5, Chemin de Blamecourt, 55000 BAR LE DUC	
	poŝ-tel. 06 98 09 62 81	pol.denis@orange.fr
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit Texte envoyé par courriel Document avec mise en page	un mois 3 semaines 2 semaines
		avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	telefono	Ret-adresoj
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Vic-sekretario <i>Vic-secrétaire</i>	S-ro Jacques HERLÉ 1, chemin du Berger 57380 MAINVILLERS	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
Kasisto <i>Trésorier</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.89.45.62.89	andreo.ag08@free.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	thibias.jean-luc@wanadoo.fr libroservo.efe@wanadoo.fr
Redaktoro <i>Rédacteur</i>	S-ro PoI DENIS 5, Chemin de Blamecourt 55000 BAR LE DUC	06.98.09.62.81	pol.denis@orange.fr
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
Asesores	S-ro Frédéric PORRETTI	03.69.77.07.24 06.15.70.15.73	popo68@evhr.net
	S-ro Roger DEGRELLE	03.82.21.92.40	roger.degrelle@wanadoo.fr
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	jeanmarie.kiry@sfr.fr
	S-ro Cyrille HURSTEL	08.70.57.68.00	cyrille.hurstel@free.fr
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Mireille ANTONI-TURCK	06 34 33 68 93	mirantur@hotmail.com
	S-ro Bertrand WICK	03.89.69.16.63	bertrand.wick@wanadoo.fr
	S-ro Alain COLLIGNON	03.83.40.35.60	colli.alano54@orange.fr

Abono al La Informilo →	Francio: 14 eŭroj Eksterlando: 18 eŭroj	← Abonnement à La Informilo
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est	← Paiement par chèque au nom de
Pagoj per giro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY	← Paiement par virement au compte
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

SOMMAIRE	
1 page frontale	
2 ours	19 Nilvange - cadre exam
3 éditō	20 Kaballah Eo
4 / 5 Villingen	21 / 22 Grésillon
6 presse (ER)	23 tankaoj / B.Behra
7 Cherpillod	24 chorale / J.Grandjean
8 médaillés	25 rotary / jubilé ĈEL
9 / 10 Clefcy	26 IKU-preleĝoj
11 / 14 Sète	27 vikipedio
15 Kaysersberg-Strasbg	28 / 29 libroservo
16 fête des langues-expo	30 anecdotes
17 brita kongreso	31 distra angulo
18 Nancy mai Europe	32 photothèque

ISSN 0291 60 37 trimestriel bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle Esperanto France-Est MJC Philippe Desforges – 27 rue de la République FR - 54000 NANCY Directeur de la publication : Edmond LUDWIG Rédacteur : PoI DENIS dépôt légal : 30 juin 2011 imprimé par l'Office Central de Coopération à l'Ecole Place de l'Ecole Normale, FR – 55000 BAR-le-DUC N° CPPAP : 0409 G 83517

Karaj gesamideanoj !



Tre sukcese disvolviĝis nia printempa kunveno en *Le Vic*.

Pro la diverslanda partoprenantaro ĝi ne restis regiona, sed iĝis internacia, kiel plejofte. Espereble ĝi ankaŭ ebligis iel mildigi la vivon de niaj japanaj gastinoj, kiuj ja rekte suferis pro triobla malfeliĉo en sia lando.

Ege dankajn vortojn sendis al mi Bardhyl SELIMI, nia gasto el Albanio, kiu erudicie kaj fervore prezentis sian malgrandan landon en le Vic, en la universitato de Mulhouse kaj en Strasburgo, okaze de la *Semajno de Esperanto*.

En ĉiuj tri prelegoj mi konstatis, ke malmulton sciis la aŭskultantoj pri tiu malgranda lando. Dank'al Esperanto nia asocio modeste kontribuis al konigo de Albanio kaj ties kulturo, lando kiu meritas esti konata, des pli ke ties loĝantoj suferis dum jaroj pro ega izoliteco. Kaj kiam oni ekscias rekte de la buŝo de amiko pri la vivkondiĉoj dum malfacila periodo, oni des pli konscias pri la bonŝanco, kiun oni havis pro vivo en paco, ekonomia bonfarto kaj libero.

Ankaŭ al tia konsciiĝo Esperanto kontribuas !

Edmond LUDWIG

pour vous initier à la seule

vraie langue internationale

pour vous perfectionner

ou éprouver le plaisir rare de converser


en espéranto !...

pour profiter de

nos stages, de nos rencontres,

de nos congrès, de nos voyages ...

"☆☆☆ ?...
- ☆☆☆ !"



**LA LANGUE DE L'AMITIE
SANS FRONTIERES**

la solution ...
un cours personnalisé
chez soi !

*rapidité...
efficacité...
deux maître-mots
de notre cours
par correspondance !*

- ☆ un matériel adapté
- ☆ une technique éprouvée
- ☆ un réseau d'animateurs performants
- ☆ un savoir immédiatement opérationnel



Edmond LUDWIG

26, route de la Schlucht

68140 STOSSWIHR

information : 03 89 77 52 55

*une diffusion
sur toute la région
et au-delà !*

esperanto
France-Est

cette pétition est déjà signée
par différents linguistes,
hommes politiques,
artistes et personnalités
du monde associatif.

grande pétition nationale
patronnée par le professeur Albert JACQUARD
l'espéranto au bac

www.esperanto-au-bac.fr

toutes informations
pour votre signature,
celle de vos proches
et amis
sur le site indiqué

à consulter !

Nous mettons à votre disposition le site internet de notre association *Espéranto France-Est*

<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

également accessible par

<http://esperanto.france.est.free.fr>

Vous serez informé non seulement sur l'histoire et sur la vie actuelle de notre association, mais encore sur les activités des groupes locaux, sur les initiatives des espérantophones isolés ...

et sur l'Espéranto en général !

Plusieurs liens vous permettront de découvrir d'autres sites originaux en France et dans le monde.

Notre rubrique "*albums photos*", complétée en permanence, vous offrira un panorama exhaustif original des événements régionaux et ... extérieurs !

une visite s'impose !

BAVELO, la landa ligo de Germana Esperanto-Asocio en Baden-Virtembergo
kaj Esperanto France-Est invitas al

Lernfesto

33-a BAVELO-Seminario kaj 70-a regiona staĝo de
16-a ĝis 18-a de septembro 2011
VILLINGEN (DE)

ESPERANTO
France-Est

Paroĥa centro St-Fidelis
Romäusring 20, 78050 VS-Villingen
Tel. Fidelis +49 - (0)7721 / 2 20 73, Fakso +49 (0) 7721 2 20 74

Esperanto-lernado estas plezuro. Aparte en la gaja komuneco de internacia lern-semajnfino. Vera lernfesto estu la ĉi-jara BAVELO-Seminario en Villingen en Nigra Arbaro. Kiu konatiĝis kun Esperanto per interreto, kiu mem instruis sin per „Lernu.net“ kaj tiel ekĝuis tiun spritan lingvon, tiu baldaŭ emas konatiĝi kun aliaj, kun samentuziasmuloj.

Ĉi-semajnfino centriĝas al la parolado, al la ek-parolado.
(Kursoj por komencantoj kaj komencintoj kun Johannes Mueller kaj Marek Blahuš).

Voĉlegado estas ĝuo. Por la aŭskultanto, ĉu eta – ĉu granda, sed ankaŭ por la voĉleganto mem. Fascinan voĉlegadon oni povas lerni. Christoph Frank, magiisto kaj pupteatristo, montras per plezuriga kurso kiel oni atingu ravan legadon. Kaj ne forgesu kunporti kelkajn tekstojn, kiujn vi tre ŝatas.



La Esperanto-mondo

estas bunta. Kiu multe vojaĝis, povas rakonti pri tiuj facetoj. Viglaj priskriboj pri travivaĵoj ĉe amikoj kaj festoj trans la propraj lingvaj baroj donas al ni ĉiuj la emon al propraj spertoj tiaspecaj.

Ĉu mi estas malparolema? Ne en Esperantujo. Entuziasme ardiĝi en Esperantaj diskutoj (kaj ankaŭ remalardiĝe trankviliĝi), tio prosperigas la vivoĝojon kaj preparas vin al ajna interparolado.
(Alois Eder)

Esperanton instrui, tio estas ankaŭ lernebla per observado, kiel aliaj spertaj instruemuloj faras. En Villingen vi havos tiun eblecon.

Por **Esperanto-parolantoj**, kiuj volas iom ripozi de la lernado, sed tamen ĝui la etoson de la staĝo, troviĝas bunta ekskursprogramo. (Inge Simon)

Kursoj kaj kursestroj petitaj:

- A Komencantoj (Johannes Mueller, Stuttgart)
- B Komencintoj (Marek Blahuš, Brno, Ĉeĥio)
- C Bukeda Kurso:
 - Voĉlegado - kia ĝojo (Bloko 1,2,3 - Christoph Frank),
 - Nia bunta Esperanto-mondo - kun viaj kontribuoj (4 - André Grossmann),
 - Diskutigi kaj pacigi (5 - Alois Eder)

Partoprenkotizo: 30 € (por junuloj ĝis 30-j. rabatite 15 €)

Tranoktado:

- La proksima Hotelo Romäus (2-minuta piedirado) disponigas 15 unu- kaj dulitaj ĉambroj (1-litaj € 40,00 ĝis € 45,00, 2-litaj € 70,00 ĝis € 79,00).
- Krome mendeblas tranoktadoj pere de la turisma oficejo (adreso en la aliĝilo)
- En la paroĥa centro *Fidelisheim* mem eblas simpla surmatraca tranoktado (matracon bv. kunporti mem) – kun matenmanĝo: 10,- €/nokte



(bv. sendi al **Inge SIMON** , Brünnner Str. 20, DE - 73431 AALEN) Inge.Simon@esperanto.de**Programo****vendredo, 16-a septembro**

Alveno ĝis la 18-a

- 15:00 por frualvenintoj:
vizito de muzeo
Franziskanermuseum kun
arkeologiaj trovaĵoj de
Magdalenenberg
- 18:30 en preĝejo St. Fidelis:
parolado diservo en la
germana kun salutado de
la esperantaj gastoj
- 19:30 konatiĝo kun ioma
manĝeto
(financa kontribueto)
- 20:30 salutvortoj,
 teatraĵo „ElefanTonoj“
(en Esperanto)
kun Christoph Frank,
poste amika kunesto

sabato, 17-a septembro

- 09:00 – 12:00 kursoj –
blokoj 1 kaj 2
- 12:15 tagmanĝo
laŭ la menukarto
en gastejo
Grossherzog
- 14:00 – 16:00 urbogvidado tra
Villingen en
Esperanto
kun Josef Schiffer
- 16:00 kafo kaj kuko
- 16:30 – 18:00 kursoj –
bloko 3
- 18:00 vespermanĝo
laŭ la menukarto
en gastejo
Grossherzog
- 20:30 Ludvespero kun
Christoph Frank

dimanĉo, 18-a septembro

- 09:00 – 12:00 kursoj –
blokoj 4 kaj 5
- 12:15 tagmanĝo
laŭ la menukarto
en Grossherzog
- poste komuna ekskurso
al la akvofaloj de
Triberg (la plej altaj
en Germanio)

Mi partoprenos kurson ...

- A : komencantoj B : komencintoj C : Bukeda kurso

tranoktado / manĝado:

- ĉambro – bonvolu mendi mem vian ĉambron, al eksterlandanoj ni volonte helpas pri mendado –
Hotelo Romäus (situas plej proksime) kun 15 unu- kaj dultitaj ĉambroj (1-litaj € 40,00 – € 45,00, 2-litaj € 70,00 – € 79,00).
adreso: Hotel Romäus, Warenburgstr. 4, 78050 Villingen-Schwenningen, Tel. +49 – (0) 7721-206 6030 (atentu: la numero trovebla en interreto/Guglo **malĝustas!**), Faks. +49 – (0) 7721-206 60 311. La hotelo ne havas interret-paĝon, sed tamen retadreson: info@hotel-romaeus.de
- Pri aliaj tranokteblecoj demandu al la turisma oficejo:
Tourist-Info, Niedere Str. 88, 78050 Villingen-Schwenningen, Tel. +49 – (0) 7721-822340, retadreso: tourist-info@villingen-schwenningen.de
- Mi tranoktos en Fidelisheim sur memalportata matraco kaj partoprenas la matenmanĝon tie:
 vendredo/sabato sabato/dimanĉo
- Mi partoprenas la programon por frualvenintoj (vendrede posttagmeze)
- Mi partoprenas la manĝeton (vendrede vespere)
- Mi partoprenas la komunan manĝon laŭ menukarto (Pizzeria Grossherzog, Großherzog-Karl-Str. 10 A, 78050 VS, Tel. +49 – (0) 7721-24784)
 sabata tagmanĝo
 sabata vespermanĝo
 dimanĉa tagmanĝo
- Mi volas manĝi vegetare
- Mi havas alergion kontraŭ _____
- Mi ĝiros la monon (laŭeble frue – *Dankon!* :-)
 BAVELO, 10-417 922, Spark. Villingen (BLZ 694 500 65)
IBAN: DE21 6945 0065 0010 4179 22,
BIC: SOLADES1VSS (Villingen-Schwenningen)
 Espĉranto-France-Est CCP 1997 72 W Nancy
ĉekoj al nia kasisto: André Grossmann (indiku celon)

nomo, antaŭnomo: _____

adreso: _____

telefono: _____

retadreso: _____

dato, subskribo: _____



Ici, les débutants apprennent le b.a.-ba de la langue.

Photo Philippe BRIQUELEUR

L'Est Républicain - 9/05/2011

Ban-sur-Meurthe.

Mais qu'est-ce que c'est que ce baragouin ? Ils sont une soixantaine aujourd'hui dans les Vosges, Russes, Allemands, Néerlandais, Albanais, Japonais et Français. À les écouter parler, on a le sentiment étrange de saisir quelque chose de familier de ces conversations et à la fois d'être projeté dans un épisode de la série culte « La 4^e dimension ».

« *Bonvenon en Esperantujo !* ». Traduction : bienvenue en « *Esperantie* », le village virtuel d'une langue artificielle née en 1887 dans la tête de Louis Zamenhof, ophtalmologue polonais. Une langue conceptuelle dotée d'une grammaire sans exception et d'une orthographe phonétique, composée de 60 % de racines latines, 30 % d'anglo-saxon et 10 % d'international.

Quand il faut 1.500 heures d'apprentissage pour un niveau baccalauréat en anglais, il en faut 150 en espéranto. En clair, « *écrivez ce que vous dites et dites ce que vous écrivez. Un langage simple sans être simpliste qui ressemble à un jeu de Lego* », plaide Jean-Luc Thibias, président de l'association nancéienne.

Sortir du tout anglais et du poids des nations

Nous serions donc face à des espérantistes. « *Noon, ils faut nous appeler espérantophones, car espérantistes* », ça nous fait passer pour une secte », corrige Edmond Ludwig, président de l'association Esperanto France Est qui rassemble 800 militants et usagers en Alsace et en Lorraine. « *Certes, on nous prend souvent pour des dingues, mais c'est une philosophie altruiste et un message de paix qui sous-tendent l'espéranto* ». Sa vocation : faciliter la communication entre personnes de langue différente et sortir du « tout anglais » et du poids de nations dominantes par leur rayonnement linguistique.

« Il serait temps que les élites et les gouvernements investissent dans cette langue ». Au parlement Européen, seul trois députés communiquent aujourd'hui dans cette langue. « Les coûts de traduction dans les institutions européennes représentent plusieurs millions d'euros ». Bien qu'ayant bénéficié de plusieurs recommandations de l'Unesco en sa faveur, la langue a longtemps souffert d'une confidentialité extrême. Depuis l'avènement d'Internet dans les années 2000, l'espéranto renaît.

En 2002, le mensuel *Le Monde Diplomatique* a lancé son édition électronique en espéranto « *La Diplo* ».

Un vaste réseau d'échanges mondiaux

Nombre d'associations proposent des cours en ligne gratuits. Et on estime aujourd'hui que 2 à 3 millions d'humains parlent cette langue et selon le linguiste finlandais *Jouko Lindstet*, elle est devenue la langue maternelle de 1.000 personnes issues de couples mixtes.

« *En France, c'est une langue qui doit être enseignée gratuitement et pendant les récréations* », plaisante Ginette Martin, ancienne institutrice. L'université de Haute Alsace de Mulhouse fait figure d'exception puisqu'elle est la seule université de France à proposer une unité d'espéranto aux étudiants. En Chine, déjà 16 universités l'enseignent. « *L'exemple vient de Hongrie. Le seul pays au monde à enseigner la langue dès la maternelle et le seul à délivrer un diplôme officiel* ».

Ce week-end dans les Vosges, un jeune Mulhousien a pris place au cours débutant. « *Je veux voyager au Canada, l'espéranto va me permettre d'avoir des contacts là-bas* ». Le « *pasporta servo* » (comprendre service passeport) créé en 1974 est un vaste service d'hébergement gratuit à destination des espérantophones. Il propose à ses membres de loger ou recevoir d'autres parlants dans le monde entier.


« *Nous avons inventé le couch surfing avant l'heure* », sourit Edmond Ludwig.

Contact et informations association *Esperanto France Est* sur internet : <http://esperantofranceest.chez.com/>

... "La malédiction de Babel" ...

Elle n'est pas inéluctable

(voir page 1)



Tout espérantophone est souvent confronté aux assertions d'un contempteur de la langue, ou simplement parfois aux interrogations d'un curieux peu ou mal informé. D'où la nécessité d'avoir à sa disposition un argumentaire bien mémorisé mais qui reste insuffisant.

Le dernier ouvrage d'André CHERPILLOD - "Dico d'Or 1998", "Grand Champion de la Dictée des Amériques 1999" et ex-membre de l'Académie de l'Espéranto- est à cet égard le vade-mecum le plus exhaustif à la disposition du prosélyte qui ne sera jamais déconcerté par une question inattendue méritant une réponse appropriée.

Il serait présomptueux de recenser et de synthétiser en quelques lignes le contenu de ce cet ouvrage dense, rationnellement conçu, qui montre la gravité du problème de l'intercommunication dans le "nouveau" monde d'aujourd'hui.

L'auteur, passe en revue toutes les solutions proposées dans les différents domaines de l'activité humaine, pour en dénoncer leur complète inanité. Nous ne serons pas surpris de constater qu'il s'attarde à démystifier l'une d'entre elles, à savoir l'adoption souvent insidieuse de l'anglais, qui résoudrait de façon satisfaisante le dit problème. Qu'on ne s'y trompe pas, il n'est nullement question de

critiquer l'anglais en tant que langue... "*l'anglais est une belle langue, une langue riche*", mais cette critique va porter sur "*le dysfonctionnement et les injustices que son usage quasi exclusif entraîne dans la société*". Une étude très poussée de ses caractéristiques amène l'auteur à faire sienne l'affirmation de Claude Hagège dans son "*Discours Amoureux des Langues*" : "*l'anglais est une langue difficile*"... qui ne répond donc absolument pas à l'un des critères exigés d'un idiome parfaitement adapté à une communication internationale. Bien entendu, André Cherpillod énonce également, preuves à l'appui, ce que tout un chacun est à même de constater ... c'est "*le vecteur d'une pensée unique, d'une pensée politiquement correcte*".

Après un chapitre non moins intéressant traitant du fonctionnement du cerveau dans l'assimilation d'une langue, qui permet à l'auteur de constater que ... "*du point de vue neuro-psychologique l'anglais n'est vraiment pas la langue qu'il fallait choisir pour la communication internationale*", il va dédier plusieurs pages à démontrer que l'espéranto satisfait parfaitement aux exigences "*della lingua perfetta*", objet des recherches d'Umberto Eco, à savoir un idiome de choix pour l'intercommunication : facilité extraordinaire, lexique le plus naturel possible, phonétique simple, capacité d'exprimer la totalité de tout ce qui peut l'être dans tous les domaines, enfin sans aucune subordination à des impératifs politiques.

Bien entendu on va lire avec intérêt l'histoire des avatars subis par l'espéranto depuis sa création, la France étant d'ailleurs nettement montrée du doigt, dans un récit riche d'informations souvent méconnues.


Des arguments émaillés de centaines d'exemples, un plaidoyer où vient s'insérer un humour de bon aloi, le lecteur va non seulement enrichir ses connaissances, mais éprouver un réel plaisir à suivre l'auteur dans son cheminement qui de prime abord aurait pu paraître trop didactique. Une réserve à signaler, l'utilisation de l'alphabet phonétique international pour traduire les particularités de plusieurs langues soumises au bistouri d'un chirurgien talentueux, il y a là comme un clin d'œil au linguiste un tant soit peu érudit qui sommeille chez tout espérantophone !

Une conclusion s'impose, **voici un ouvrage à consulter sans modération !**

PS - en vente à notre libro-servo.

D. P.

HAGAR DUNOR le Viking



ESPERANTO

André GROSSMANN

Adultes, Adolescents (16 ans et +)

Esperanto, langue de communication internationale, d'une grande facilité d'apprentissage pour une intercompréhension plus démocratique, équitable et une ouverture sur le monde. Une grammaire sans exception, sans verbe irrégulier. De plus en plus de sites esperanto sur internet, pour apprendre, pour s'informer, pour communiquer et se comprendre.

Mardi : 18h30 à 20h Débutants


Jeudi : 18h30 à 20h Avancés

1^{er} contact : Mardi 21 septembre à 18h30**Honor-medalo por pli ol 15 jaroj da aktivado por Esperanto en Illzach (Alta-Alzaco)**

Lunde, la 30-an de majo 2011, nia federacia kasisto André GROSSMANN ricevis de la urbestro de ILLZACH (apud Mulhouse) honor-medalon por pli ol 15 jaroj da bonvolema aktivado en la belega kulturcentro ESPACE 110. Tie li gvidas plurfoje dum semajno Esperanto-kursojn kaj prezidantas/kasistas por la grupo MULHOUSE-ESPERANTO. Antaŭ la multnombra ĉeestantaro André kompreneble profitis la okazon por reklami pri nia lingvo kaj ĝin aŭskulti. Vi sciuj, ke pro siaj kasistaj funkcioj en diversaj asocioj li kutimas sin prezenti per gramatika kuriozaĵo : mi estas « kasistoj » !!!

Gratulon kaj dankon pro lia senlaca laborado !

Edmond Ludwig

**Robert ESCRIOU, médaillé des "Lions de France".**

Okaze de la vizito en St-Mihiel (FR- 55300) de la regiona "gouverneur" de la citita asocio, nia samideano, kiu fondis antaŭ kvindek jaroj la urban klubon, ricevis honor-medalon pro lia longa dediĉo al la mult-faceta agado de la "Lionoj" ...

Senprobleme, Robert Escriou taksis esperanton normala anteno de la helpema asocio, kaj iĝis agema prozelito de la internacia lingvo.

Plurfoje li alportis sian helpon al nia iama prezidanto Jean-Paul Colnot en Nancy, eĉ gvidante kursojn, kiam necesis.

La Informilo ĝojas siaflanke gratuli fidelan membron de la GEM (*Groupe Espéranto Meuse*)

NB – el la redakcio : La celoj de la "Lions de France" similas certagrade al tiuj de la "Rotary", kies punktan agadon, lige al esperanto, niaj legantoj povos legi aliloke.

kolapsas "La Merkato"...

Karaj IKEF-membroj kaj simpatiantoj,

Estas dissendita kaj enretigita la 100-a numero de la IKEF-revueto "La Merkato". Ĝi enhavas i.a. la jar-raporton pri 2010, kaj artikolon pri afrika financa sistemo "Likelemba". Nun oni komencu la diskuton pri la estonto de Internacia Komerca- kaj Ekonomia Fakgrupo, IKEF ...

La centa numero de "La Merkato" verŝajne estas ankaŭ la lasta. Iam estis kvar numeroj jare, sed nun malfacilas plenigi eĉ unu numeron. Ĉar preskaŭ ĉiuj IKEF-membroj havas ret-aliron, povas sufiĉi la rubriko "Novaĵoj" ĉe www.ikef.org. Por membroj sen ret-aliro eblas 1 aŭ 2 fojojn jare sendi kelkajn printitajn foliojn.

Nun en Ĉinio estis menciinda aktivado de IKEF dum la jaro 2010. Estus normale, ke ankaŭ la sidejo de IKEF translokiĝus al tiu lando. Nia ĉina peranto, *s-ro Wang*, intencis kandidatiĝi kiel prezidanto dum la ĉijara UK en Kopenhago, sed li ne kapablos ĉeesti la kongreson. Li tamen estos venontjare en *Hanojo*, kaj tie kandidatiĝos.

La tuta numero 100 de "La Merkato" (.pdf, 1,24 MB) estas legebla kaj elŝutebla ĉe

<http://www.ikef.org>

Bonvenon al la interesiĝantoj en la forumo kaj novaĵlisto de IKEF ĉe:

<http://groups.google.com/group/komerco>

laŭ *Roland Rotsaert*

(NB el la redaktejo de "La Informilo" ... Konstatigas, ke iom post iom "forpasas" valoraj bultenoj, revuoj, dokumentoj, ĝis nun "klasike presitaj", kiujn dum jardekoj -eĉ pli !- ŝatis la abonintoj aŭ legintoj "konkrete palpi" ... Nu, ŝajne tiu nermalhavebla, plua plezuro malaperas, profite al simpla premo de klavo, por okulumi al "malviva" ekrano de komputilo ! Ni iĝas vere strangaj "ĝuantoj" ! ? ! ... *Pol DENIS*).

69a Regiona Staĝo de Esperanto 1 / 2 / 3-ajn de aprilo 2011 En la Domo Notre Dame des Monts de la asocio les Amis du Vic 88230 BAN SUR MEURTHE CLEFCY

Jen plensukcese okazis tiu internacia renkontiĝo en la Vogezoj. Du gravaj programoj estis proponitaj kaj allogis entute pli ol 60 partoprenantoj. Krome la vetero estis aparte favora en tiu montara kadro ĉe la domo Le Vic.

Vendrede vespere jam okazis la unuaj programeroj, prezentado de turismaj eblecoj en Albanio kaj de japana papero-teatro kun du teatraĵoj.

Sabate matene estis turisma programo por ĉiuj. Ege interesa vizito al bombono-fabriko en la vilaĝo Le Valtin. Tie eblis vidi ne nur la maŝinojn, la produktojn sed ankaŭ la fabrik-procedojn, kun interesaj klarigoj. En la vendejo eblis aĉeti plej diversajn bombonojn.

En Clefcy troviĝas giganta sekojo de la jaro 1870. La tuta grupo iris tien kaj klopodis ĝin ĉirkaŭ plurope.



Post la tagmanĝo, Jean-Luc prezentis la plej novajn librojn de nia libro-servo. Dume alvenis pliaj partoprenantoj.



En la posttagmezo okazis unuflanke la prelegoj de Bardhyl Selimi pri Albanio. Li pritraktis plej diversajn temojn rilate al sia lando, t.e. la kulturon, la historion, la lingvon, kiu estas ege malnova. Aparte interesis la publikon la periodo de izoliteco de Albanio, kiun la preleganto aparte emfazis.



Aliflanke tuta grupo interesiĝis pri plantoj kaj laŭ gvidado de fakulino kolektis diversajn manĝeblajn plantojn kaj florojn en la apuda naturo. Ili preparis por ĉiuj toastojn.

Krome funkciis kurso por komencantoj gvidata de Laurent Philippe kaj alia por progresantoj gvidata de Edmond Ludwig.



FaMo estis la kantisto de nia vespera koncerto. Li eminente kantis en la franca kaj en Esperanto. Lin akompanis lia amiko Tarek. Pluraj kantoj troviĝis en la staĝo-libreto.

Makiko gvidis en la mateno gimnastiko-kurson kaj Roberto lerte zorgis pri la knajpo. Ĉe la fino Edmond gratulis ĉiujn kontribuantojn, dank'al kiuj, ni ĝuis mirindan semajn-finon.



Tekstoj de Andreo

Fotoj de Inge, Ginette, Andreo



Opinioj de CLEFCY al Sendaj

Skribas Ginette Martin

Nia staĝo en La Vogezoj estis granda sukceso, pli granda ol mi povis revii.

Ni estis entute 70 partoprenantoj, kelkaj venis nur por unu manĝo, multaj venis por la tri tagoj. Ni estis multe da francoj, kompreneble, sed ankaŭ ĉeestis 11 germanoj, 2 rusoj, 2 japanoj, 1 albano kaj 1 nederlandano. Vere internacia renkonto.

La japanoj, kiuj spertis ne-certecon veni ĝis la lasta momento, finfine povis veni.



Keiko el Sendaj

Ili estis la sunradioj de nia renkonto, ĉiam bonhumoraj kaj tre dinamikaj. Keiko venis de Sendaj kaj spertis la tertremegon, sed ne la cunamon, ĉar ŝi loĝas je 30 km de la marbordo, kaj la ondo invadis la teron ĝis 20 km, do ŝia domo ne estis damaĝita.

Dum kelka tempo, ŝi vivis sen iu ajn novaĵo pri la eventoj, ĉar ŝi restis en la domo pro la sen-

ĉesaj tertremoj, kaj la elektro paneis, do ankaŭ la televido. Ŝi povis aŭdi novaĵojn per radio-aparato, sed vidis kelkajn bildojn nur du tagojn poste, kiam venis ĵurnaloj, kaj la televido funkciis ĉe ŝi nur la kvinan tagon, kun la reveno de la elektro. Nur en tiu tago ŝi konsciis pri la amplekso de la dramo. Dum du semajnoj, ŝi vivis sen akvo, kaj kiam ŝi venis en Francion, la gaso ankoraŭ ne revenis en ŝian domon.

Trajnoj inter Sendaj kaj Tokio ne plu funkciis kaj la busoj estis tre maloftaj. Ŝi devis rezervi lokon dek tagojn antaŭ la vojaĝo. Per iu miraklo, ŝi sukcesis havi lokon kaj renkontis sian fratinn Makiko en Tokio por komuna vojaĝo. (Makiko loĝas en Jokohamo). Ambaŭ fratinoj estas tre dinamikaj. Keiko prezentis al ni bildoteatron kaj Makiko gimnastikigis nin dufoje ekstere. La loko de nia staĝo estis tre agrabla, en plena naturo kun suno kaj varmo de printempo, kiu estis preskaŭ



Matena gimnastiko kun Makiko



Simone kaj Ginette ricevas gratulojn de Edmond

varmo de somero. Vere paradiza loko kaj paradiza etoso.

Estis ebleco aŭskulti plurajn prelegojn de Bardhyl SELIMI. Helpe de la kompetentulino Heidi COLLOMBIER, aliaj preferis instruiĝi pri sovaĝaj manĝeblaj plantoj: plukado en plena naturo kaj poste preparo de bon-gustaj frandaĵoj per la trovitaj plantoj por proponi ilin aperitive.



Heidi COLLOMBIER



Esperanto-instruado okazis je komenca nivelo kun Laurent PHILIPPE kaj je perfektiga nivelo kun Edmond LUDWIG.

Vendrede vespere, ĉiuj povis aŭskulti la informojn de Bardhyl Selimi pri Albanujo, kaj poste spekti la bild-teatraĵeton de Keiko Sampei kaj koni japanan vidpunkton pri la katastrofoj en Japanio. Sabate dum la distra vespero, ĉiuj ĉeestantojn ĝuis la tre energian kaj originalan koncerton de Famo akompanata de Tarek.

Sabate matene multaj ŝatis la proponon, viziti fabrikon de bombonoj kaj poste piediri kaj brakumi rimarkeblan gigantan sekojon.

Dimanĉe posttagmeze, iuj profitis por viziti senpage la muzeon de Saint-Dié, kiu prezentas tre interesajn kolektojn.

Fotoj pri la evento estas videblaj ĉe:

www.ipernity.com/home/67411 kaj ĉe:

<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

Ginette Martin

Interasocia Renkontiĝo de Esperanto ĉe Mediteraneo



22 - 26 de aprilo 2011

TRUJ 2011

sete

En 2005 okaze de la cent-jariĝo de la unua kongreso en Bulojno ĉe maro okazis la unua Interasocia Renkontiĝo de Esperanto, interkonsente kun du gravaj asocioj Esperanto-France kaj SAT-Amikaro. Tiam estis planita okazigi tiajn komunajn aranĝojn ĉiujn 3ajn jarojn.

Tamen tio ne povis okazi laŭplane en 2008. Sed ĉi-jare en Seto en tre oportuna ferio-centro "Lazaret" povis refoje okazi la ĉi-jara Interasocia Renkontiĝo de Esperanto kun partopreno de diversaj francaj asocioj: Esperanto-France, Sat-amikaro, FFEA (fervojistoj), FKEA (katolikoj), GEE (instruistoj), Eurokka laŭ invito de Langvedoka-Rusiljona Esperanto-Federacio.

Ĝi arigis pli ol 360 partoprenantojn kun abunda programo kaj tre variaj distraj vesperoj. Allogaj ekskursoj ebligis malkovri la urbon Seto kaj interesajn lokojn en la regiono.

Jam vendrede posttagmeze estis proponita vizito al fiŝ-aŭkciado. Estis interese konstati, kiom la nunaj teknikaj rimedoj per komputiloj rapidigas tiajn vendadojn, sen sovaĝaj kriadoj.

En sabato la vetero estis pluva, kun fortaj ventoj, la maro iĝis ege maltrankvila. Tial la ŝip-ekskurso al la lago Thau (kvazaŭ interna maro) ne povis plene okazi. En tiaj cirkonstancoj nia ekskursiva ŝipo navigis nur en la haveno. Trans la digo eblis konstati la furiozajn marajn ondojn. Tamen estis preferinde resti interne de la ŝipo ol sur la ferdeko, kie ja eblis pli bone admiri la havenon sed ankaŭ esti duŝita de fortaj ondoj. Iuj tion spertis. Ĉu kulpis la kapitano??


FaMo per kantoj kaj akordiono enkondukis la interkonan vesperon en la granda salono "Mediteraneo".

Jen ampleksa partoprenantaro por tiu komuna foto farita ĉe la marbordo, iom ekster nia ferio-centro. Certe tiam la vetero ne allogis al sunumado aŭ naĝado. Eble pro tio la organizantoj sukcesis venigi ĉiujn (aŭ prekaŭ ĉiujn) al la mar-bordo por komuna fotado.




**Jacques Yvart chante
Georges Brassens
en espéranto**

samedi 23 avril à 22h
salle Georges Brassens



La urbo Seto estas ankaŭ fame konatata pro tre ŝatata franca kantisto Georges Brassens (se oni komprenas la lingvon). Jacques Yvart kantas liajn kantojn en Esperanto-traduko. Lia koncerto okazis ĝuste en la koncertejo "Georges Brassens" de la urbo Seto. Ni ĝuis liajn kantojn kaj lian voĉon.

Kun aparta subteno de la urbestro de Sète, Jacques Yvart ofertas esceptan koncerton en la salonego "Brassens" omaĝe al naŭdekjara jubileo de la naskiĝo de Georges Brassens en Seto en 1921. Post "Jacques Yvart kantas Georges Brassens" aperinta en 1998, en 2011 aperas "Brassens plu". Yvart kantas por ni grandan kolekton da kanzonoj el tiuj du albumoj.



En 2010 okaze de SAT-Amikara kongreso en Iliono (Bretonio), tiu asocio mendis ĉe profesia filmisto Dominique Gautier filmon pri Esperanto kaj ties movado.

Premiere ni havis la privilegion spekti tiun dokumentan filmon "Esperanto". Ĝi prezentas la historion de la lingvo, nian movadon kun multaj intervjuoj ĉu en la franca, ĉu en Esperanto kun subtitoloj en la franca. Ĝi transdonas la vidpunktojn de la reĝisoro pri la movado, kiun li malkovris dum la fimado.

Unu ekzemplero estis antaŭmendita por nia asocio EFE.



Dimanĉe vespere refoje ni veturis aŭtobuse al la salono Brassens. Tie estis proponitaj du koncertoj de gravaj ensembloj.

Kaj Tiel Plu, fama kataluna ensemblo prezentis originalan repertuaron kun tradiciaj metodoj okcitanaj kaj katalunaj kaj tekstoj en Esperanto.

Kapriol' frisa ensemblo, parto de antaŭe ekzistanta ensemblo "Kajto", proponis muzikan vesperon. Ambaŭ ensembloj ricevis varmajn aplaŭdojn.

Sed jen, subite ĉiuj muzikistoj kune ludis por komuna koncerto de ambaŭ ensembloj.



Pli poste Kapriol' proponis kolektivitan dancadon kaj invitis la publikon ĝin partopreni.

Multaj entuziasme akceptis la inviton. Tial la vespero iĝis eĉ pli vigla kun tradiciaj dancoj. Ĝi finiĝis nur malfrue.

Jes, vere riĉaj distraj programoj.

Rezulto de la voĉdonado Parta renovigo de la komitato	
• Michèle Abada-Simon	140
• Jeanne-Marie Cash	221
• Philippe Chavignon	218
• Raymonde Coquisart	201
• Aleks Kadar	202
• Christian Lavarenne	196
• Sébastien Montagne	220
• Gaston Riéra	137
• Axel Rousseau	209

Dimanĉe okazis en la granda salono "Mediterraneo", matene la Plen-kunsido de SAT-Amikaro kaj posttagmeze la Ĝenerala Membro-Konveno de Espéranto-France. Sébastien Montagne, la nuna kasisto, sukcesis poluri la finanĉan situacion de la kantoj. Unu el la plej gravaj temoj estis la kampanjo **"L'Espéranto au Bac"**, kiun ambaŭ asocio subtenas. Granda laboro estas jam farita per la subskriboj de pluraj eminentaj personoj. Ili troviĝas sur 4-paĝa dokumento, kiu klarigas la celon de tiu kampanjo. Multaj dokumentoj estis je dispono de la grupoj, asocioj, individuoj, por propagandi kaj kolekti subskribojn.

Jen, ĉi-apude la rezulto de la voĉdonado por parta renovigo de la komitato de Espéranto-France. **Axel Rousseau** iĝis prezidanto de la asocio.



La lasta vespero de la aranĝo estis vere eminenta. Unue okazis teatraĵo de la Tuluza Trupo. "Grandioza Kongreso" dum kiu, novulo perdiĝas inter la diversaj (mal)fermitaj giĉetoj. Rolis Kiki Vidotto kaj Marc Roger.

Poste JoMo enkondukis la kantiston Patric, kiu kantis en la okcitan lingvo. Inter tiuj kantoj iuj fame konataj.



La prezentado de JoMo kaj Solniška estis vere grandioza. La muzikistoj de la grupo "Liberecanoj" kun cigana muziko, iom da jida, kelkfoje rokaj ritmoj miksitaj kun slavaj sonoj plenigis la salonon kaj kaptis la atenton de la publiko. Al tio aldoniĝis la klarigoj kaj kantoj en Esperanto de Jomo.

La danc-ensemblo Solniška, du ĉarmaj dancistinoj kaj ege lerta dancisto kompletigis la tuton por plene ravi la spektantojn.

Belaj melodiaj, kaj ĉamaj kantoj, ekzemple "La kanto de Lara", "Moskvaj Vesperoj", "Nathalie" kaj multaj aliaj.

La dancisto de la grupo ne nur mirinde lerte dancis kozakajn dancojn sed ankaŭ mirige imitiis danc-paron el Laponio, sentime transpaŝante al la publiko.

La organizantoj de tiu renkontiĝo plene sukcesis plezurigi la partoprenantojn, kiuj reciprokis per abunda aplaŭdado.



Tekstoj de Andreo kaj fotoj de Mikaelo

Jen la lasta ekskurso, ŝip-veturado sur la suda kanalo. Aparte interesa, ke ĝi estis planita kaj konstruita antaŭ pli ol 300 jaroj. Necesis konstrui 64 kluzojn. Nia ŝipo transiris la 9 kluzojn de Fonseranes-en-Béziers. Poste la navigado iĝis tute kvietra tra ĉarma pejzaĝo sub ombroj de multaj platanoj. Bon-gusta manĝo estis servita sur la ŝipo.

La tuto finiĝis per vizito al vinkelo kaj al antikva vilaĝo Ensérune.



INTERNACIA RENKONTIĜO DE ESPERANTO ĈE MEDITERANEO

Ĝi okazis ĉe la Mediteranea maro en la urbo Seto (Sète). Ĝi estis bone organizita. La aranĝon partoprenis ĉirkaŭ kvar cent esperantistoj ne nur el Francio, sed ankaŭ el foraj landoj. Venis gastoj el Japanio, Kubo, Nepalo, Rusio kaj el pluraj eŭropaj landoj.

La inaŭguron ĉeestis la urbestro kaj la vicurbestro de la urbo Seto. La urbestro s-ro François Commeinhes bonvenigis nin kaj deziris al ĉiuj agrablan restadon. Poste sinsekve salutis la publikon reprezentantoj de diversaj organizaĵoj kaj esperantistoj el ĉeestantaj landoj. Sekvis invito al honorvino. Ĉe la strando ni komune fotiĝis.

La aranĝo okazis ne tro malproksime de la urbo-centro en la familia feriejo "Le Lazaret". Tie estis ĉio necesa por akcepti la partoprenantojn. Riĉa taga, vespera kaj ekskursiva programo kontribuis al bona etoso dum kvin tagoj plenumante dezirojn de ĉiuj ĉeestantoj. La oferto de prelegoj estis abunda. Kompreneble (kiel ofte okazas en ĉiuj E-aranĝoj) ne eblis ĉeesti ĉiujn proponitajn programe-rojn ĉar pluraj okazis samtempe.

Kunvenis kaj kunsidis Espéranto-France, Sat-Amikaro, Fervojistoj, FET, EDE kaj aliaj. Ĉiuj asocioj kaj laborgrupoj havis eblecon labori kaj diskuti pri siaj agadoj kaj organizaj aferoj. Okazis KER-ekzamenoj. Ni spektis premieron de interesa dokumenta filmo pri Esperanto. Plue ni eksciis kiel Esperanto helpis al migranto el Kongo al Francio por ricevi politikan azilon. Sekvis diskuto pri helpo al rifuĝintoj en tiu-ĉi ne facila situacio. La japanino Sanpei Keiko parolis pri la antaŭ nelonge okazinta tertremo kaj cunamo en Sendai. S-ro Narendra Raj Bhattarai el Nepalo rakontis pri sia lando, respondis al multaj demandoj kaj invitis al la Internaciaj Himalajaj Renkontiĝoj, kiuj okazas ĉiun duan jaron. Pri la E-edukado ĉe Interreto parolis kaj la atelieron pri Vikipedio gvidis Marek Blahuš el Ĉeĥio. Fervojistoj parolis pri vagonara signalado kaj André Mirc prezentis mallongan dokumenton pri la rapideco de trajnoj. La humuron en verkoj de Lorjak kaj Beaucaire prezentis Ĵak le Puil, pri Ker-ekzamenoj informis Katalin Kováts, pri Majaa kulturo kaj kalendaro Philippe Chavignon, pri Kubo Maritza Gutierrez González, pri la lasta verko de Jules Verne Abel Montagut, pri peresperanta solidareco en Bosnio parolis Senad Ĉoliĉ. Pri langvedoka historio informis kaj bildojn prezentis Arno Lagrange. Okazis forumo pri la okcitana lingvo kaj aliaj interesaj programoj.

Dum la interkona vespero akordionludis Famo. Li ankaŭ akompanis koncerton de Jacques Yvart. En la urba salono "Brassens" la fama kataluna ensemblo Kaj Tiel Plu



Keiko kaj Liba

kaj la frisa ensemblo Kapriol' kantis kaj vigle dancis la ĉeestantojn. La etoso estiĝis plaĉa kaj gaja.

La lastan adiaŭan vesperon ni spektis tri programerojn: La Teatra Trupo de Tuluzo prezentis

"Grandioza Kongreso" verkita de Rikardo Cash. Patric ofertis al ni serion da okcitanaj kantoj. JoMo prezentiĝis unuafoje kun la muzikistoj kaj dancensemblo Solniška. Ĝi estis admirinda kaj neforgesebla slavecstila spektaklo kaj cigana etoso per kiuj finiĝis la lasta vespero.

Okazis pluraj duontagaj ekskursoj. Eblis promeni sur la monteto "Saint-Clair" kaj ĝui belan panoramon de la urbo aŭ ŝippromeni en la haveno de Seto kaj spekti fiŝaŭkcion laŭ nuna moderna elektronika maniero. En Cap d'Agde ni vizitis lokan muzeon pri kolekto de trovitaĵoj en akvo kaj poste la nigran strandon el bazalteroj.

Dum la lunda tuttaga ekskurso ni malkovris la Sudan Kanalon, navigis sur ĝi per ŝipo trapasante plurajn kluzojn kaj admiris ĉirkaŭan pejzaĝon dum bongusta tagmanĝo. Poste ni aŭskultis historion de vinberkultivisto kaj gustumis plurajn speciojn da lokaj vinoj. Ĉe la fino de la ekskurso ni promenis en restaĵoj de opidumo (antikva fortigita loko per remparo kaj fosaĵo) kaj trarigardis muzeon pri arkeologiaĵoj. Alia samtaga ekskurso gvidis la intereso-lojn al Eta Kamargo.

Dum la marda tuttaga ekskurso ni vojaĝis per vaportrajno tra la pitoreskaj cevenaj montetoj de Anduze ĝis St. Jean-du-Gard. Tie ni tagmanĝis kaŝtanjajn specialaĵojn en belstila restoracio. Sekvis vizito al ekzotika bambuejo. Admirindaj estis ne nur bambuaj aleoj kaj arbaro, gigantaj sekvojoj kaj palmoj, sed ankaŭ multaj belaj floroj, kaktaj kaj bonsajoj en aparte bela naturo. Laste ni vizitis muzeon pri historiaj kamparanaj tradicioj, pri produktado de silko, bredado de silkraŭpoj kaj krome ni vidis aliajn interesajn aĵojn.

En la ampleksa kaj belaspekta broŝuro ni trovis, krom la programo de la renkontiĝo kaj praktikaj informoj, mapojn pri la urbo kaj loko kie ni estis, historion de la regiono Langvedoko, informojn pri la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo kaj raportojn pri aliaj allogaĵoj de la regiono. Estis eldonitaj E-bildkartoj, poŝt- kaj glumarkoj.

Dum la libera tempo eblis rigardi kaj aĉetumi en bone proviziita libroservo. Ĝin prizorgis pluraj asocioj. Oni ekspoziciis multan materialon por vendi: librojn, muzikdiskojn, bildkartojn, glumarkojn insignojn kaj aliajn kutimajn esperantaĵojn. La elekto estis abunda kaj varia.

Bona ideo efektiviĝi komunan renkontiĝon de pluraj Esperanto-asocioj plensukcesis. Ni ĉiuj ĝuis agrablan restadon eĉ se la suno ne ĉiam favoris nin.

Liba Gabalda



Raportas Liba

En Kaysersberg
la 13/14ajn de majo 2011

Li Ŝi kaj Senso Ĉielo : de la originoj al kuniĝo pere de amo ! Spektaklo de Jim PETIT kaj ties trupo ARTOTUŜI

La misteroj de la origino de nia surtera vivo ja restas mistero, sed poezio kaj muziko, arta prezento sursceneja sukcesis ravi nin dum ni sidis en la mallumo de la spektejo. Esperanto, la justa komunikilo interhoma, rolis kiel perilo apud muziko kaj danco. La elekto de tiu lingvo iĝis evidentaĵo por la aŭtoro kaj komponisto Jim PETIT, kies trupo sukcesis tremetigi impone multnombrian publikon en la bazara urbeto KAYSERSBERG. Post enkonduko perkuta fare de lokaj koleĝianoj, la orkestro de kordaj, blovaj kaj perkutaj ekzotikaj muzikiloj delikate ekvojaĝigis nin tra la kosmo. Klara ina voĉo kant-recitis, dum emociojn tradukis korpen du graciaj dancistinoj. Tradiciaj muzikiloj alikulturaj certe jam per si mem sukcesis nin logi foren, sed elektronika amplifikilo tute adekvate uzata ankoraŭ pli kontribuis al kreo de ŝveba ĝuado.

La publiko disponis pri la esperantlingva teksto kun traduko al la franca. Ĝi do ankaŭ malkovris Esperanton. La ĉeestantaj esperan-



tistoj kompreneble ne malavaris kun informoj al la petintoj.


Konklude : spektinda prezento, kiu meritas diskonatigon, certe ankaŭ en la esperantista medio. Al Jim PETIT kaj ties gekompanoj ni danku pro la agrabla maniero reklami pri la Internacia Lingvo.

E.L.

Esperanto en la Eŭropa Parlamentejo en Strasburgo

Tiun jaron, denove, oni ankaŭ parolis pri Esperanto dum la tradicia tago de malfermaj pordoj de la Eŭropa Parlamentejo, kiu okazis dimanĉe, la 8an de Majo 2011.

La strasburga klubo deĵoris kun alzacaj kaj germanaj



samideanoj por promocii Esperanton al la 17000 vizitantoj, kiuj ĉiuj vidis la budon sekvante la cirkviton de la vizito. Esperantistoj ankaŭ ĉeestis la debaton, kiu okazis en la grandega kunveno de la parlamentejo. La temo estis : volontulado kaj bonvolemo en Eŭropo.

Kompreneble (kaj feliĉe) ne ĉiuj vizitantoj haltis ĉe nia budo, sed tamen multaj interesiĝis. Ni esperas, ke ni transdonis al ili la deziron lerni la zamenhofan lingvon kaj ke ni vidos kelkajn denove okaze de esperanta kurso aŭ renkonto.

Anne VERNET

Tradicia festo de la lingvoj en la Universitato de Alta Alzaco : elstaris la bretona kaj parencaj gallo-lingvoj.



Sabate la 12-an de marto 2011 okazis la tradicia festo de la lingvoj en la Fakultato pri Beletro, Lingvoj kaj Sociaj Sciencoj de Mulhouse. La senlaca subtenanto de Esperanto, la dekanato Yann Kerdiles, denove invitintis ankaŭ la klubon Mulhouse-Espéranto. Ĉe ampleksa budo kun ekspozicio deĵoris du helpemaj ĉi-jaraj gestudentoj de la nunjara universitata kurso, Caroline kaj Hugo. Helpantoj de la loka klubo estis Fernando NKUMA, André GROSSMANN, Edmond LUDWIG kaj Roberto KUENY. Ĉi-lastaj ja estas konata kiel deklamanto de poemoj en Esperanto. Sekve lia sonora voĉo, kiu neglektis la mikrofonon, mirigis la ĉeestantaron, kiam li demonstris tute klare, deklamante La cikado kaj la formiko de Jean de LA FONTAINE, ke la internacia lingvo Esperanto tute taŭgas por poezio ! Ni informu, ke proksimume 50 lingvoj estas parolataj en tiu universitato (proksimuma nombro kalkulita laŭ la deveno de la gestudentoj), kaj 15 inter ili estas instruataj tie, inter ili Esperanto. E. L.



Sabate la 12-an de marto 2011 okazis la tradicia festo de la lingvoj en la Fakultato pri Beletro, Lingvoj kaj Sociaj Sciencoj de Mulhouse. La senlaca subtenanto de Esperanto, la dekanato Yann Kerdiles, denove invitintis ankaŭ la klubon Mulhouse-Espéranto. Ĉe ampleksa budo kun ekspozicio deĵoris du helpemaj ĉi-jaraj gestudentoj de la nunjara universitata kurso, Caroline kaj Hugo. Helpantoj de la loka klubo estis Fernando NKUMA, André GROSSMANN, Edmond LUDWIG kaj Roberto KUENY. Ĉi-lastaj ja estas konata kiel deklamanto de poemoj en Esperanto. Sekve lia sonora voĉo, kiu neglektis la mikrofonon, mirigis la ĉeestantaron, kiam li demonstris tute klare, deklamante La cikado kaj la formiko de Jean de LA FONTAINE, ke la internacia lingvo Esperanto tute taŭgas por poezio ! Ni informu, ke proksimume 50 lingvoj estas parolataj en tiu universitato (proksimuma nombro kalkulita laŭ la deveno de la gestudentoj), kaj 15 inter ili estas instruataj tie, inter ili Esperanto. E. L.



Antaŭ-staĝa ekspozicio en Anould kaj Fraize

Dank'al la kontaktoj de Simone CAJELOT kun la respondeculino pri komercaj rilatoj ĉe la poŝtaj servoj, la poŝtoŭficejo de ANOULD (88) disponigis al Espéranto France-Est sian tutnovan kaj modernan ekspoziciejon en la poŝtoŭficejo mem por prezenti dum unu monato antaŭ la staĝo en la apuda Klefcy la 12-panelan ekspozicion pri Esperanto. Haveblis ankaŭ prospektoj kaj kalendaretoj.

La paneloj prezentantaj la servojn de JEFO al la junularo estis prezentitaj dum la sama tempo en la Turisma Oficejo de Fraize. E.L.




Prelego pri Albanio en Strasburgo komence de Aprilo

Samideano Bardhyl SELIMI prelegis dum la printempa staĝo de Espéranto France-Est en Klefcy (Departemento Vogezoj) kaj plugastis en mia hejmo. André GROSSMANN proponis al la strasburga grupo, ke li ankaŭ prelegu en Strasburgo. Mi do veturigis Bardhyl al Strasburgo, vizitigis al li la urbon, aŭskultigis al li la esperantan version de la komentoj sur la turisto-ŝipoj – mirinda atingo de la strasburgaj samideanoj – kaj akompanis lin al prelegejo, pensante ke mi havos la okazon ĝui lian prelegon, ĉar dum la staĝo mi mem dume instruis. Sed ... Bruno taskigis min interpreti ! Tion mi iom timis, ĉar Bardhyl sufiĉe rapide parolas. Mi tamen akceptis, kvankam mi preferas traduki skribe. Eble mi tamen sukcesis, ĉar studentino, kiu daŭre notis la diritaĵojn, deziris resti en rilatoj kun li cele al verkado de memuaro. Alia telefonis venonttage por peti lian ret-adreson.

La ege interesan kaj densan prelegon ĉeestis kaj kelkaj klubanoj, kaj seso da gestudentoj de la universitato de Strasburgo.

Edmond Ludwig.





92a Brita Kongreso de Esperanto okazinta de la 8a ĝis la 10a de aprilo 2011 en Eastbourne

Eastbourne troviĝas tute sude en Britio ĉe la marbordo. Tie okazis la 92a Brita Esperanto-kongreso kun iom mistera kongresa temo: Lumturoj, lumuloj kaj lumajŝoj. La kongreson partoprenis proksimume 80 personoj, inter kiuj deko da eksterlandanoj el Belgio, Japanio, Pollando, Ĉinio kaj Francio.

Plej multaj loĝis en proksimaj kaj komfortaj hoteloj ĉe la marbordo kaj la kongresejo estis parto de la kolegio de la urbo. La inaŭguro kaj interkona vespero okazis en la impona urbodomo.




Agrablaj promenadoj ĉe la marbordo

La kongresaj temoj, kiuj unue aspektis tute misteraj, estis ege lerte pritraktitaj, laŭ plej diversaj vidpunktoj, sciencaj, filozofiaj, historiaj, emociaj, humoraj. La prelegantoj vere lerte prezentis kaj sukcesis rilatigi sian prelegon al unu el la temoj.

John Wells klarigis pri la koloroj de la lumo. La ĉielarko ja konsistas el multe pli ol sep koloroj, kies nomojn ni eĉ ne konas aŭ ne kutimas uzi, krome ili varias laŭ la lingvoj.

Ankaŭ la urbo Eastbourn ja iel rilatas al ĝi. Sallys Phillips tion ruze kaj amuze komprenigis al ni.

Peter Bolwel esploris pli fore pri planedoj, stelgrupoj kaj ties lumoj.



Prelegas Sallys Phillips

Dum la aranĝo okazis apartaj programeroj por gejunuloj. Jen HUANG Xiaojuan el Ĉinio, studanta nun en Britio, salutas de la monteto-supro.



Kiel atingi lumturon ĉe la klifoj? Jen taŭga boato, tre utilaj projektaj vestaĵoj kontraŭ malvarma vento. Sed ĉefe necesas ne ŝanceliĝi kaj resti bone sidanta. Tre

interesa sperto kaj feliĉo atingante la finon. La klarigojn lerte tradukis Helen Fantom, (ĉe la unua vico.)




Daŭre agrablis la vetero en tre ĉarma kaj turisma sud-brita urbo. Jen migrado al havena ponto VICTORIA.



Fotoj kaj tekstoj de Andreo

... Ni ankaŭ enpartoprenis !...



Nancy
MAI de l'Europe 2011



Tiun tradician feston denove organizis sukcese la urbo Nancio. Kadre de la "Eŭropa vilaĝo", de la 5a ĝis la 7a de majo, en la moderna komerc-centro "Saint-Sébastien", ni budis, prezentante Esperanton, laŭ la temo "La propravolo".

Inter niaj specifaj kaj diversaj propravolaj agadoj ni konigis al la publiko *Solidarecan Agadon*, "Pasportan Servon", *eldonon de revuoj*, *tradukon de libroj*, *internaciajn renkontojn*, *lingvo-kursojn*...

Multaj homoj haltis antaŭ nia budo. La interdiskutadoj ĉiam estis interesaj, kaj kelkfoje longdaŭraj.

Inter la vizitantoj, ni menciis la konsulon de Slovakio, kun kiu Jean-Luc parolis, kelkajn studentojn, geamikojn de la ĉeĉa junulo *Marek* el Brno, junan esperantiston el Nederlando, NICO HUURMAN, studento en la kadro de la programo *Erasmus*, kiu surpriziĝis pri nia ĉeesto en tiu loko ! Ankaŭ li konas Marek !

Nia enpartopreno estis trafa okazo por reklami pri la peticio "l'espéranto au bac !". Ĉirkaŭ 150 subskriboj estis rikoltitaj ...

Dankon al sinjoro *Oger*, prezidanto de la "Eŭropa vilaĝo". Li ebligis la distribuon de flugfolioj pri esperanto en la diversaj budoj.

La nanciaj klubanoj dankas ankaŭ gesinjorojn Gilbert, Greiner kaj Edmond Ludwig, kiuj helpis ni dum tiu fruktodona manifestado.

laŭ raporto de Liliane BERSWEILER




photo Micheline COLNOT

Esperanto
Edukado Traduko
Pasporta-servo Kursoj
Stajoj Renkontoj
Wikipedia Eldono
Kulturo Gastigado Kongresoj Festivalo Traduko
Revuoj Solidareco Muziko
Propravola-helpado



La tria staĝo por lerni kaj praktiki Esperanton kunigis pli ol 20 partoprenantoj en Nilvange, nordoriente de Francio, de la 4a ĝis la 8a de aprilo. Nia loka asocio : *Espéranto Thionville* organizis la aranĝon kun *Franca Fervojistista Esperanto Asocio*. Kune, ni allogis partoprenantojn el Belgio kaj el diversaj francaj regionoj.

La programo estis tre riĉa...

Matene *Bernard Vivier* gvidis paroligan kurson por progresantoj, kaj *André Cherpillod* klarigis al la spertuloj la tiklajn gramatikajn punktojn de la esperanta lingvo. Ĉiutage postagmeze ni vizitis la regionon : muzeo de la lorena fervojisto en la vilaĝo *Rettel*, fortikaĵo kaj muzeo de emajloj en *Longwy*, muzeo-centro "Pompidou" en *Metz* kaj finfine la luksemburgan ĉefurbon.

Ĉiuvespere okazis kultura programo...

Filmo farita de *Bernard Vivier* kaj *Marie José Behm* pri la Baltaj Landoj, filmo "*Water Makes Money*" pri la privatigo de akva servo kaj ties problemoj, prelego "*Kial kaj kiel Esperanto estas facila lingvo ?*" de *André Cherpillod*. Li klarigis al la publiko, ke Esperanto respektas la tendencon de la homo al ĝenerala asimilado, filmo farita de *Bernard Vivier* kaj *Marie José Behm* pri la Universala Kongreso 2005 en *Vilno*, Litovio, filmo "*Renkontiĝo en Bolivio cele al pli justa ekonomio*", kiun prezentis *Daniel Cano*.


Ĉiuj estis kontentaj pri la programo kaj pri bongusta manĝaĵo, ĉio en bona etoso.

Ni rendezuos venontjare en aprilo. Por instigi lernantojn paroli esperante, ni serĉadas instruiston el eksterlando. Ni celas ankaŭ inviti eksterlandajn partoprenantojn por praktiki kune Esperanton. La regiono estas verda kaj belega, apud tri najbaraj landoj (BE, LU, DE). La restado estas malmultekosta.

Bonvolu kontakti : esperanto-thionville@laposte.net <http://www.esperanto-thionville.ass0.fr/>

Bruno HENRY

Graveco de Eŭropa Referenckadro por Lingvoj por Esperanto Testoj pri skriba kompreno en la universitato de Mulhouse (FR)



En universitatoj la tiel nomataj *Liberaj Instru-eroj* (*UE libre : Unité d'Enseignement libre*) dum kiuj eblas – inter aliaj fakoj – ankaŭ eklerni novan lingvon, postulas la nivelon A1 fine de la unua jaro. La niveloj, laŭ la *Eŭropa Referenckadro* estas A1, A2, B1, B2, C1 kaj C2 se vi deziras instrui la lingvon aŭ certi pri altnivela posedo.

Disponante pri nur 2 horoj semajne, ne eblas daŭre testadi dum tiu tempo. Necesas uzi la tempon por instrui ! Krome, ĝis nun ne eniris la universitatojn eksteruniversitataj institutoj, kiuj proponas tiajn prilingvajn ekzamenojn pagendajn. Tamen mi ne rezistis la tenton esplori, ĝis kia grado oni povas iri post 40 horoj da studado ĉe gestudentoj en universitato.

Ok gestudentoj sekvis la kurson, inter ili brila germana studentino el *JENA*, kiu sekvis nur unu semestron kiel *ERASMUS-studentino* kaj bedaŭrinde ne plu povis ekzameniĝi.

Ĉe la **parola kompreno laŭ proksimuma nivelo B1** (memfabrikita tasko) sukcesis 6 inter 7 gestudentoj, notoj inter 08/20 kaj 17/20. Poste mi disdonis du taskojn de **oficiale agnoskitaj taskoj pri skriba kompreno**, la unuan je nivelo B1, la duan je nivelo B2. Ĉiuj sukcesis ĉe la nivelo B1 kun la jenaj notoj : 20 – 20 – 20 – 19 – 18 – 18 – 18 Same ĉiuj sukcesis ĉe la nivelo B2 kun la sekvaj notoj : 20 - 20 - 18 - 16 – 14 - 14 – 10.

Temas kompreneble pri gestudentoj, kies gepatra lingvo estas la franca, kaj kiuj jam lernis en la liceo du aliajn fremdajn lingvojn. Tamen : **mi dubas, ke post kvardeko da horoj iu ajn tia studento kapablus atingi la saman nivelon de kompreno en iu ajn etna lingvo, eĉ parenca.**


Ni memorigu, ke la teorie postulata nivelo dum la bakalaŭro-prepara klaso (post eĉ sepjara studado de lingvo) estas B2 !

... / ...

Mi do kuragigas niajn kursgvidantojn direkti siajn gelernantojn al trapaso de ekzamenoj laŭ tiu ekzameno-sistemo. Jen ebleco mezuri la rezultojn en la instruado de Esperanto kaj komparado kun la instruado de etnaj lingvoj.

Edmond LUDWIG

Kabbalah Esperanto



"Kabbalah Esperanto" estas la unua volumo de am-romano de Olivia Cattan, prezidantino de la mult-kultura, sekulara, feminista, ne-partipolitika kaj civitana asocio "Paroles de femmes" (Paroloj de virinoj).

Ĉe la paĝo Pourquoi ce livre ? (Kial tiu libro ?) de ĝia retejo, Olivia Cattan klarigas sian malkovron de Esperanto :

"Mi malkovris la destinton de tiu lingvo, de tiu familio Zamenhof ekstermita pro malamo de Hitler, de tiuj esperantistoj senditaj fare de Stalin al gulagoj. Mi eksciis ankaŭ, ke multaj kluboj ekzistas tra la mondo, kaj ke pli ol 10 milionoj da homoj parolas tiun paco-lingvon. Mi, kiu partoprenis en multaj pac-konferencoj, mi diris al mi, ke tiu lingvo povus fariĝi la ŝlosilo de la interpopola frateco, kaj tiam mi eklernis ĝin."

... / ...

Ne strikte ligita al la supraj linioj, sed por aludi alian supre aluditan verkon de la aŭtorino, povas esti utile rememorigi la ekziston de kooperativa vilaĝo "La Pacoazo" (Neve Shalom — Wahat al-Salam), konsistanta el 40 familioj de judoj kaj palestinaj araboj, kies retejo estas en pluraj lingvoj, inkluzive Esperanto.

Kabbalah Esperanto

"Kabbalah Esperanto" est le premier volume d'un roman d'amour d'Olivia Cattan, présidente de l'association multiculturelle, laïque, féministe, apolitique et citoyenne "Paroles de femmes".

A la page Pourquoi ce livre ?, Olivia Cattan explique comment elle a découvert l'espéranto :


"Je découvris le destin de cette langue, de cette famille Zamenhof décimée par la haine d'Hitler, de ces Espérantistes envoyés au goulag par Staline. J'appris également que de nombreux clubs existaient dans le monde et que plus de 10 millions de personnes parlaient cette langue de paix. Moi qui avais participé à de nombreuses conférences sur la paix, je me dis que cette langue pourrait peut-être devenir la clé de la fraternité entre les peuples, alors je me mis à l'apprendre."

... / ...

Sans lien strict avec les lignes qui précèdent, mais pour faire allusion au titre d'un autre ouvrage de l'auteur cité plus haut, il peut être utile de rappeler l'existence d'un village coopératif, "l'oasis de paix" (Neve Shalom /Wahat al-Salam), rassemblant 40 familles juives et arabes palestiniennes, dont le site internet est donné en plusieurs langues, y compris l'espéranto.

d'après Henri MASSON

UEA MEMBRIĜIS EN INFOTERM



La 10-an de majo Universala Esperanto-Asocio subskribis interkonsenton pri kunagado kun Infoterm, la Internacia Informejo por Terminologio.

Per tio UEA fariĝis membro de Infoterm, fondita en 1971 per kontrakto inter Unesko kaj Aŭstra Normiga Instituto (ASI). Infoterm celas i.a.



interŝanĝi informojn, subteni kaj kunagadi por projektoj, renkontiĝoj, eldonaĵoj ktp., ĉefe en la kampo de terminologio.

Infoterm devenas el la terminologia esplorcentro, kiun fondis kaj longe prizorgis Eugen Wüster, esperantisto kaj fondinto de la moderna terminologia scienco. Infoterm funkcias ankaŭ kiel sekretariejo de la Teknika Komitato TC37 de Internacia Organizaĵo por Normigado (ISO), kun kiu UEA havas oficialajn rilatojn jam ekde 1991.

Pri la rilatoj de UEA kun Infoterm kaj la Teknika Komitato TC37 de ISO respondecas nova komisiito, Mélanie Maradan el Svislando. La estraro de UEA nomumis ŝin por tiu funkcio en sia aprila kunsido.

fonto: Ret-Info

<http://www.eventoj.hu>

Retpoŝta novaĵ-servo kun selektitaj E-novaĵoj



Vi ne povas viziti la Universalan Kongreson en Kopenhago ? ...

Nu, atendas vin alloga kaj multfaceta somerprogramo en nia "verda, franca kastelo" !

La Kulturdomo proponas restadojn en la kastelo de la 17a de julio ĝis la 24a de aŭgusto 2011. Vi povas elekti la daŭron de via restado (laŭtaga tarifo) aŭ resti tutan semajnon (ĉio-inkluziva prezo) ; vi povas partopreni semajnan kurson por plu-lerni Esperanton (70 €), ĉeesti nur kulturajn aktivajn (35 €) aŭ mem aranĝi vian liberan restadon. Elektu vian propran formulon...

Praktike : tajpu simple
<http://www.gresillon.org>

kaj en maldekstra rubriko vi ricevos ĉiusepacajn informojn, interalie pri aliĝilo, tarifoj ... ktp !

2011 jul – 17 / 23

Seminario kun prelegoj pri lingvo kaj edukado Intensivaj €-kursoj kaj FEL-ekzamenoj (François Lo Jacomo)

1. Thierry Saladin (Francujo) *Profundiĝo en gramatiko* por prepari la ekzamenon (intensa kurso 5 horojn tage)
 2. Jean-Luc Kristos (Francujo) *Ludu ni* por paroli iomete, multe, pasie ! (intensa kurso 5 horojn tage)
 3. F. E. I. (*Franca Esperanto-Instituto*) Ekzamenoj de unua kaj dua gradoj (jul-21/22)
 4. Seminario de 4 prelegantoj pri « *Esperanto en la oficiala edukadsistemo* »
- Manüel - Emanuele Rovere (Italujo) *Muzika prezento* de kantoj E-igitaj el itala kaj angla lingvoj (jul – 22, 20h30)
 - Marie Savary (Francujo) *Veki-Jogo* por komencantoj kaj pli-spertuloj
 - Jean-Luc Kristos (Francujo) *Kantu ni ! Dancu ni !* (posttagmeze). *Kanzonvespero*
 - Michel Dechy (Francujo) *Konatigi Esperanton per bildrakontoj*
 - François Lo Jacomo (Francujo) *La Akademio de Esperanto*
 - Claude Hagège (Francujo) « *Esperanto kaj la lingva diverseco* », filmita intervjuo el 2004
 - Przemek Grzybowski (Polujo) *Prelegserio pri interkultura edukado*
 - Marie Savary (Francujo) *Himalajaj fotoj* : temploj apud Katmanduo ; 4-taga migrado al Anapurno ; naskiĝloko de Budho

2011 jul – 23 / 30

Alternativa semajno (ekologio, kuracmetodoj, verda turismo) €-kursoj matene. Vegetaraj manĝoj (Xavier Godvier)

1. Nina Korĵenevskaja (Rusujo) *Kurso por progresantoj*, kiuj ankoraŭ ne parolas - aŭ ne havas sufiĉan parolpraktikon
 2. Ranganayakulu Potturu (Barato-Hindujo) *Konversacia kurso universitat-nivela* pri aktualaj fakaj temoj el ekologio, scienco kaj kulturo
- Manüel - Emanuele Rovere (Italujo) *Muzika prezento* de kantoj E-igitaj el itala kaj angla lingvoj (2011-jul-..., 20h30)
 - Marie Savary (Francujo) *Jogo okcidenta* por komencantoj kaj plispertuloj

- Xavier Godivier (Francujo) *Biciklaj promenoj en la ĉirkaŭaĵo de Greziljono - per via biciklo*
- Nina Korĵenevskaja (Rusujo) *Mallongaj skeĉoj* por hobiaj aktoroj - spertuloj kaj komencantoj en Esperanto
- Ranganayakulu Potturu (Barato-Hindujo) *Prelegoj pri Ajurvedo* (tradicia alternativa hinda medicino), ĝenerala historio kaj kulturo de Barato
- Marie Savary (Francujo) *Fotoj el Nepalo* : temploj ĉirkaŭ Katmanduo, plurtaga piedirado antaŭ Anapurno, Budha naskiĝloko
- Nina Korĵenevskaja (Rusujo) *Prelego pri rusa pentroarto* per lumbildoj
- Lorenzo Tomezzoli (Italujo) *Karaokeon* spekti kaj mem fari

2011 – jul 30 / aŭg-06

Kursoj de franca lingvo kaj Esperanto matene
Ekskurso al Luar-kasteloj posttagmeze (Jannick Huet)

1. Peonio Nian (Ĉinujo) *Kurso de franca lingvo* por ne-franc-lingvanoj
 2. Nina Korĵenevskaja (Rusujo) *Paroliga kurso* por tiuj, kiuj havas bazan nivelon kaj deziras ekparoli
 3. Ranganayakulu Potturu (Barato-Hindujo) *Kurso por fluparolantoj* de universitata profesoro pri diversaj sciencaj, kulturaj kaj ekologiaj temoj
- Manŭel - Emanuele Rovere (Italujo) *Muzika prezento* de kantoj E-igitaj el itala kaj angla lingvoj (jul-31, 20h30)
 - Ekskursoj, posttagmeze al Luar-kasteloj kaj aliaj vidindaĵoj en la regiono.
 - Gennadij Yaskov, Renata Chassard (Rusujo...) *Radioamatoroj* per sia sendstacio aktivigas la Greziljonan voksignon F5KSP por akumuli kontaktojn mondvaste
 - Nina Korĵenevskaja (Rusujo) *Teatraĵoj kaj skeĉoj* por komencantoj kaj spertuloj
 - Ranganayakulu Potturu (Barato-Hindujo) *Prelegoj kun fotoj* pri Barato, ĝiaj kasta socio, ekonomio, politiko, geografio, historio, filozofio
 - Nina Korĵenevskaja (Rusujo) *Lumbild-prelego* pri pentroarto franca kaj alilanda

2011 – aŭg 08 / 15

Junulara internacia renkonto **FESTO** kun muzika festivalo (Vinilkosmo)
Informojn petu de **JEFO** (Alekĉjo, Emĉjo, Sebĉjo, Flo, Joop, Kvenĉjo, Roĉjo, Stela)

2011- aŭg 15 / 24

Festa semajno por infanoj, junuloj, familioj. Post-FESTO
Muziko, gitaro, sporto, ludoj, artumado kaj €-kurso (Bert Schumann)

1. Jean-Luc Kristos (Francujo) *Ludu ni* por paroli iomete, multe, pasie ! (modera Esperanto-kurso, matene)
 2. Rolande Cleizergues (Francujo) *Bildludoj* por lerni vortojn
- Jean-Pierre Poulin (Francujo) *Gitara kaj basgitara kurso* pri akordoj, notoj, kaj gamoj ; komuna ludado laŭ viaj muzikstilaj preferoj
 - Samy Loisse (Belgujo) *Origamio*, japana arto de paperfaldado
 - Rolande Cleizergues (Francujo) *Maskoj* el gips-bendoj
 - Caroline Mauboussin (Francujo) *Ateliero de libro-bindado* : bindi sian propran libron
 - Jean-Pierre Poulin (Francujo) *Improvizado* de muzikaj gamoj per viaj instrumentoj ; esplorado de muzikaj etosoj el la tuta tero
 - Jean-Luc Kristos (Francujo) *Kantu ni ! Dancu ni !*
 - Bert Schumann (Germanujo) *Aktivaĵoj amuzaj* (societaj kaj sportaj ludoj, promenadoj kaj ekskursoj)
 - Daniel Durand (Francujo) *Prelegoj kun lumbildoj* pri Afrikaj urboj, " *Bona Espero* ", homaj rajtoj, mondaj solidareco kaj civitaneco

Kontribuas niaj fidelaj abonantoj ...

Tankaŭ (el japana 短歌, *tanka*: mallonga poemo) estas tradicia japana poeziaĵo konsistanta el unu vertikala 31 silaba linio, enhavanta kvin fonetikajn partojn de 5, 7, 5, 7, 7 silaboj. En Esperanto, **tankaŭj** aperas en kvin horizontalaj linioj de 5, 7, 5, 7, 7 silaboj. La unua tri partoj (17 silaboj) nomiĝas *kami no ku* (*supra strofo*), kaj la restantaj du partoj (14 silaboj) nomiĝas *shimo no ku* (*malsupra strofo*). La plej praaj **tankaŭj** aperis en la 7a jarcento, do la formo estas multe pli aĝa ol la pli konata hajko.

(VIKIPEDIO)

Tiujn ĉi tankaŭjn majstre verkis nia samideano **Bernard BEHRA**, memorigante pri la ĵusaj katastrofoj, kiuj vundis Japanion. Koran dankon al li !

*Mi ne komprenas,
sed pense kunsuferas.
Ho Japanio !
Tro da plagaj eventoj
por Sunleviĝa Lando.*

*Ŝatinda regno
nun terure vundita,
sed jam japanoj
kuraĝe pacienas,
zorgas, batalas, flegas.*

*Malfacilaĵoj
nek venkos, nek triumfos,
sed nasku volon
konsoli, rekonstrui,
printempigi la korojn.*

*La tuta mondo
kompatas kaj sincere
deziras al vi
fieran renaskiĝon,
pacon, novan feliĉon.*

Libera Ponto



Luc PLAMONDON*, représentant officiel du Canada au *festival du film francophone* d'Angoulême (FR-16007) [Interview de **la Charente Libre** – extrait ...]



"Pourquoi la francophonie est-elle si importante pour vous ?


Parce que la langue française est en danger ? Je ne sais pas si ici en France on le mesure bien. On pense plutôt aux aspects commerciaux quand on parle de francophonie, mais c'est la culture qu'il faut défendre, car elle est à la base de tout. Les américains eux l'ont bien compris.

Pour vous la langue anglaise est moins riche que le français ?

C'est une évidence... L'anglais est en train de devenir l'espéranto du XXI^e siècle avec pas plus de 100 mots de vocabulaire ! Il est tiré vers le bas par la mondialisation, alors que le français est une langue qui tire vers le haut. D'ailleurs, à l'étranger, le public demande très souvent que je donne mes comédies musicales en français et non en anglais... "

*auteur-compositeur avec à son actif plus de 500 chansons et de grandes comédies musicales, *Starmania*, *Roméo et Juliette*, *Notre-Dame de Paris* ...

Kiam esperanto eniras repertuaron de vilaĝ-horon ...



"La 30 membroj de la ĥoro de *Bonzée* (FR 55) kunvenas ĉiulunde por kunkanti.

En la ĉijara programo troviĝas fama skandinava popola kanto "*Vem kan segla forūtan vind*".

Nia partituro enhavis la svedan tekston kaj la francan tradukon de la unua strofo. Marie, nia ĥorestrino lernigis nur tiun francan tekston, ĉar neniu membro konis la svedan prononcadon...

Tamen, kiam ni estis finfine pretaj por la kantkoncerto, ŝi hezitis elekti tiun kanzonon, trovante ĝin iom tro mallonga. Mi do proponis esperantan tradukon, kiun mi jam verkis de kelkaj tagoj. Miaj ĥorkolegoj bonvole akceptis tiun proponon. Tamen, ni devis rapide lerni la novan strofon (skribita por 4 voĉoj), ĉar la koncerto okazos la venontan semajnon !...

Ni jam bone konis la muzikon, sufiĉis lerni la esperantan tekston. Mi legis la frazojn, klarigante la gravajn malsimilecojn ĝis akiro de bela prononcado de la E-literoj... Poste la kantantoj ripetis, ripetis denove kaj kantis. Tiu trejnado daŭris apenaŭ duonhoron, kaj ĉiu kantanto bone parolis esperante !...

Mi subite fieris, kial ? Ĉu mi estas tre bona instruisto ? Ĉu Esperanto estas facila lingvo ? Mi restu modesta! Vero estas en la dua propono... 30 personoj ekkonsciis pri tiu evidenteco !

Finfine, la kant-koncerto okazis la 26an de marto en la preĝejo de *Mont-Villers* (FR 55), ni fervorege kantis "*Kiu povas veli sen vento*"... kaj ni ricevis riĉan aplaŭdadon ! " .

Joël


*Kiu povas veli sen vent'
Kaj sen ramilo rami ?
Kiel lasi for amatinon,
Sen sufer', sen larmo ?*

*Mi mem povas veli sen vent'
Kaj sen ramilo rami,
Tamen mi ne povas perdi
Amatinon sen plori.*

Ki - u po - vas ve - li sen vent' kaj sen ra - mi - lo ra - mi? Ki - el la - si for a - ma - tin - on

sen su - fe - (er) sen lar - mo? Mi mem po - vas ve - li sen vent' kaj sen ra - mi - lo ra - mi

ta - men mi ne po - vas per - di a - ma - tin - on sen plo - ri.



"Lernu.net" atteint le seuil des 100 000 usagers enregistrés




D'après un communiqué de [Esperantic.org](http://esperantic.org), le site d'apprentissage de l'espéranto "[Lernu.net](http://lernu.net)" atteint le seuil des 100 000 usagers enregistrés.

Lernu.net est le plus visité des sites d'espéranto dans une trentaine de langues avec environ 100 000 pages visitées par jour, avec plus de 100 volontaires aides et traducteurs, et maintenant une communauté de 100 000 usagers enregistrés dans 240 pays ! Pour fêter l'événement, l'équipe de *lernu* organise un concours pour créer des publicités pour le site

(informations en français : http://fr.lernu.net/mia_lernu/konkursoj/centmil/index.php)

Rotary et esperanto



Un jeune espérantiste brésilien semble décidé à relancer la promotion de l'espéranto au sein du mouvement rotarien.

Voici le site qu'il vient de créer : <http://radesperanto.org/?lang=fr>

Voici également deux vidéos où il présente sa démarche :

<http://www.youtube.com/watch?v=xXluzysdeE0>

<http://www.youtube.com/watch?v=iOGNyBMM0hE&feature=related>


Les rotariens parlent une multitude de langues, mais ils ne sont certainement pas tous capables de s'exprimer couramment dans une ou plusieurs langues étrangères. Quant au *Rotary International*, six langues y jouissent d'un statut officiel, et on peut s'attendre à ce que le russe, l'allemand et le chinois se joignent au lot. C'est pourquoi RADE*** recommande l'adoption de l'espéranto comme langue de communication internationale... Facile à appliquer et pratique à tous les points de vue, l'espéranto est la seule langue qui satisfasse au *Critère des Quatre Questions* du Rotary.



*** Rotaria Amikaro de Esperantistoj (RADE)

Des membres de la RADE ont créé et dirigent une institution de formation éducative et professionnelle où 40 enfants et adolescents défavorisés vivent sur un domaine écologique où ils sont protégés, éduqués et instruits. Il s'agit de la ferme-école *Bona Espero*, située à *Alto Paraiso*, à 200 kilomètres au nord de *Brasilia*, où des volontaires internationaux s'occupent des enfants en utilisant l'espéranto dans la vie quotidienne. Un partenariat entre le district brésilien 4530 et le district argentin 4900 soutient actuellement le projet en coopération avec la Fondation Rotary.

Jubileo de ĈEL



Vendrede, 20an de majo, en Pekino, okazis la 60-jara celeburo por la jubileo de la *Ĉina Esperanto-Ligo*. Renato Corsetti, Gabrielo Corsetti, Mike Jones, Takaŝi Ago, Karlo kaj kelkaj aliaj eksterlandaj Esperantistoj ĉeestis kune kun multnombra ĉina ĉeestantaro.

Estis tri aferoj de la aranĝo, kiuj pensigis min pri efika strategio.

Unue, kvankam la Ligo ne estas tutspace aktiva, ĝi ludis gravan rolon por la sukcesa eldonigado de *El Popola Ĉi-nio*, la daŭra elsendado de *Ĉina Radio Internacia*, kaj la antaŭnelonga eknaskiĝo de ĉina, *esperanta televido*. Indaj, gratulindaj aferoj.

Due, la filmo pri *Esperanto kaj Ĉinio* estis ege bon-kvalita kaj ofte kortuŝa. Tiu filmo meritas esti vidata de ĉiuj


Esperantistoj kaj por informi kaj por motivigi. Mi esperas, ke la talentuloj, kiuj faris tiun filmon pretos helpi por eĉ internaciaj esperantaj filmo-projektoj.

Trie, la parolado de Renato Corsetti bone tuŝas la defion nian por la venontaj jaroj. Sesdekjariĝo estas gratulinda afero, kiel naskiĝdatreveno, sed gravas ankaŭ la venontaj 60-jaroj. Ĉinio, miaopinie, tiurilate povas, eĉ eble devas, ludi pli grandan internacian rolon rilate Esperanton.

Refoje, gratulon al la Ĉina Esperanto-Ligo, ke la venontaj 60-jaroj estu sukcesplenaj. Ni ĉerpu profiton el iliaj spertoj ankaŭ.

Dennis Keefe

De Zamenhof gis la cielo en la 64-a IKU !...



21 universitatoj kaj aliaj fakuloj proponis prelegon por la 64-a sesio de la *Internacia Kongresa Universitato*, kiu okazos dum la *96-a Universala Kongreso de Esperanto* en Kopenhago (23-30 julio 2011). Tio estas pli ol duoblo de la naŭ prelegoj, kiuj konsistigos la programon de IKU. La proponoj estis prijuĝitaj de la Komisiono pri IKU, surbaze de kies rekomendo la Estraro de UEA faris la finan decidon. Jam pli frue la Estraro elektis prof. *Christer Kiselman* kiel la rektoron de la 64-a IKU.

En Kopenhago okazos naŭ IKU-prelegoj:

- Davide Asorti: "*La Zamenhofa revo inter lingvistiko kaj religio*";
- Vera Barandovská: "*Interlingvistika dialogo ĉe Otto Jespersen*";
- Eva Bojaghieva: "*Oksigeno, utila kaj danĝera por la homo*";
- Erik Hoeg: "*La profunda ĉielo – kredo kaj scio 2500-jara*";
- Hidenori Kadoja: "*La vikinga epoko, naciismo kaj historiografio*";
- Jacob Nordfalk: "*Maŝintradukado*";
- Tsvi Sadan: "*La 'reviviĝo' de la hebrea sen mitoj*";
- José Antonio Vergara: "*Aidoso*";
- Amri Wandel: "*Astrobiologio kaj la 50-jara serĉado de ekstertera inteligenteco*".


La prelegoj de Eva Bojaghieva, Tsvi Sadan kaj Amri Wandel estos samtempe kursoj de *Akademio Internacia de la Sciencoj*.

La dumkongresaj AIS-kursoj konsistas el tri prelegoj, el kiuj la IKU-prelego estos la unua kaj ĝin sekvos de du daŭrigaj prelegoj por pli profunda traktado de la temo. La kunlaboro inter IKU kaj AIS komenciĝis en 1995.

La prelegotekstoj aperos en la t.n. IKU-libro, lanĉota en la UK. Kelkaj antaŭaj volumoj estas ankoraŭ haveblaj ĉe la Libroservo de UEA. Pluraj IKU-libroj estas konsulteblaj en la IKU-sekcio de la kongresa retejo de UEA, kie baldaŭ aperos ankaŭ la resumoj de la Kopenhagaj prelegoj: <http://www.uea.org/dokumentoj/IKU/index.html>

Internacia Kalendaro pri Esperanto-Renkontiĝoj: <http://www.eventoj.hu>

ILEI denove en kunlaboro kun kastelo Gresillon



Venas nun al fino unusemajna kursaro, kun la celo pretigi kandidatojn por nun okazanta ekzamena sesio laŭ la *Europa Referenc-kadro*. Tio restarigas je praktika nivelo kunlaboron inter la Kastelo kaj ILEI***, kiu lauplane fariĝos kontinua.

Tiu engaĝiĝo de la instruista ligo estas logika kaj utila; la celo de la kastelo estas ja funkciigo de eduka centro, kaj preskaŭ ĉiuj el ĝiaj pioniraj fondintoj en 1954, sub la gvido de *Henri Micard*, estis aktivaj membroj de GEE, la franca sekcio de la freŝe fondita ILEI (1949).

Kursoj okazis je du niveloj, unu sub gvido de *Christophe Chazarein*, kaj la alia (la pli supera) gvidita de la prezidanto de ILEI, *Stefan MacGill*.

Sub la titolo '*Verve pri verboj*' la 16 patroprenintoj vagis au vadis tra la unika verb-sistemo de Esperanto, apli-kante la sciojn praktike en la plenumo de kelkaj rol-ludoj, de ampleksa kunlaboriga tasko, kaj krome plenumo de pluraj ekzamenpreparaj ekzercoj, nelaste kelkaj pri aŭskulta kompreno, ĉu el la ekzamena specimenkolekto, ĉu el la libro de *Katalin Kovats* : "*Ĉu vi scias, ke*"...


Al la KER-ekzamenoj prezentis sin 32 kandidatoj, preskaŭ egale dividitaj inter la niveloj B1, B2 kaj C1. Tio signifas, ke ĝi superis en grandeco la sesion antaŭ deko da tagoj en la nacia kongreso en Sete.

Kvankam ILEI ne plu povas formale partopreni en la ekzamena strukturo kun UEA kaj ITK, ĉi tiu proksima kunlaboro montras nian praktikan subtenon de sistemo de oficiale rekonataj ekzamenoj.

ILEI * Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

Stefan MacGill

... pri " VIKIPEDIO " ...



08 / 04 - *Marek Blahuš*, tiutempe staĝanto de E@I en Nancy, publike prelegis en Strasburgo pri la temo "*Vikipedio: 10 jaroj, kaj poste ?*" kadre de la aranĝo *Semajno de Esperanto*.


La esperantlingva prelego, okazinta en la *Instituto de tradukistoj, interpretistoj kaj internaciaj rilatoj (ITI-RI)* de la *Universitato de Strasburgo*, estis simultane interpretata en la francan lingvon de *Cyrille Hurstel*. Ĉeestis dekelk personoj, plejparte germanaj kaj francaj esperantistoj, sed ankaŭ minimume du neesperantistoj.

18 / 01 - *Esperanto-Wikipedia* atingas **140.000** artikolojn.

NB – Marek, kiu ne plu studas en Nancy, atentigas nin pri sia nova adreso:

Marek BLAHUŠ
Rudy Kubička 1002
CZ – 68605 Uherské Hradiště

— pri esperanta kino-festivalo ! —



Karaj amikoj,

Krea unuiĝo "*Filmoj sen limoj*" kun subteno de TEJO ĝojas prezenti al vi freŝan unikan kulturalan eventon !...

Temas pri la **unua Esperanta kino-festivalo**, kiu okazos de la 10-a ĝis la 13-a de julio 2011 en *San-Paŭlo*, Brazilo, dum TAKE.

La oficiala retejo de kinofestivalo estas <http://kinofestivalo.org>.

La Kinofestivalo konsistos el du programoj: konkursa kaj nekonkursa.

Ĉiu ajn povas partopreni la konkursan programon kaj gajni premion: unu el 5 *iPod Touch 4-gen*.


La informa filmeto pri konkurso: <http://vimeo.com/21927597>

La nekonkursan programon partoprenos filmoj, kiuj estas ligitaj kun Esperanto, kaj ankaŭ premiitaj filmoj kun voĉtraduko kaj subtekstoj el la internacia lingvo.


Partoprenu la konkurson, rakontu pri ĝi al viaj amikoj, kunlernantoj, esperant-istoj, kaj ĝuu la filmojn !

Kunlabore,
Aleksander Osincev,
dissendoj@mail.ru
kreanto de *Verda Filmejo*, direktoro de Esperanta Kinofestivalo

fonto: *Ret-Info*
<http://www.eventoj.hu>



Internacia Kalendaro pri Esperanto-Renkontiĝoj: <http://www.eventoj.hu>



En la film-ĵurnalo *UEAviva* aperis nova eldono, en kiu *Probal Dasgupta*, *Claude Nourmont* kaj *Barbara Pietrzak* rakontas pri la aprila kunsido de la Estraro de UEA:

http://www.youtube.com/ueaviva#p/a/u/0/ngpq_Flm5Tw



El nia libroservo

Informoj

⇒ La libroservo provos partopreni la komunan semajnfinan staĝon organizitan de Bavelo Esperanto France Est en Villingen en Niigra arbaro la 16/18ajn de septembro 2011. Multaj el niaj 680 titoloj atendas vin tie sed se vi volas certe trovi dezirata(j)n libro(j)n (sen devigo ĝin (ilin) aĉeti), sendu al mi mesaĝon al libroservo.efe@wanadoo.fr JLT



Resumoj, recenzoj, opinioj...

Flugi kun kakaduoj (Trevor STEELE) FE L, (16,50 € en nia libroservo, vidu Informilo n° 152)

En la gazetaro de la iamaj koloniaj imperioj sentiĝas pli kaj pli ofte malbona konscienco rilate la pritraktadon de la indiĝenoj en la mondregionoj konkeritaj en la daŭro de kelkaj sekoloj. Jen ankaŭ Trevor STEELE rakontas romane la konkeron de Aŭstralio fare de la brita imperio en la 19-a sekolo kaj vi ja scias, ke per la figuroj de rakonto ni pli proksime kunvivas la problemojn de la envolvitaj konkerantoj kaj konkeritoj. Tial vi certe aprecos la fajnajn portretojn de tiuj blankuloj kaj nigruloj (aŭ « nigroj », kiel ilin nomas la koloniantoj), jesja, nigras kaj blankas la haŭtkoloroj, sed la pentraĵo neniel nigrablankas, ĉar ja temas pri homoj, kiuj certe interbatalas, sed ankaŭ kapablas amikiĝi, lerni unu de la alia, eĉ se tre ofte tiuj rilatoj estas ĥaosaj kaj la luktado ĝismorta. Tiel mi invitas vin malkovri la historion de Elmaru, la tragikan amikiĝon de Billy DIXON kaj Jangabara, kromnomita « anaseto », la heroo de la Banubi-tribo, la kumbataladon de la policisto Pullmer kaj la strangsintena aborigeno Macky, la vivkutimoj de la lokaj triboj, pri kiuj ne nepre konsentus modernaj virinoj ! Sed mi ne rakontu tro detale !

Certe tiu romano vin cerbumigos pri tiu epoko, kiel tion faras la figuroj de la lasta ĉapitro ! Legu, vi ne bedaŭros !

E. L.

Nomoj kaj sortoj (Julia SIGMOND) Eldono EXIT Cluj-Napoca 2011

La nomoj de la herooj konsistigas la titolojn de la 12 ĉapitroj de tiu 110-paĝa libreto. Kaj vi legos pri la sorto de tiuj homoj ! Kiaj vivhistorioj ! Malfacilas la vivo por la plejmulto inter ili ! Post kelkaj ĉapitroj mi eĉ komencis deprimi, ĉar mi havis la impreson, ke mi legis raportojn de procesoj prifamiliaj en la loka gazeto, en kiu rakontatas la ĉiutaga mizero de la mondo ! Kvazaŭ ĵurnalista rakonto en amasgazeto ! Sed oni kompatas !

Feliĉe min reĝojigis la 10-a ĉapitro, en kiu la lingvo de la « esperantoj » redonas ielan esperon de pli bonkora mondo. Per la Internacia Lingvo la aŭtorino trovis sin, ŝi trovis la « Grandan Sekreton » de sia vivo ! Sed la postaj du ĉapitroj denove mergas nin en mizeran mondon, eĉ se dum la tuta libro ekstremantaj lumtremetoj prilumigetis eĉ la plej mallumajn vivovojojn !

Julia SIGMOND, la aŭtorino, etna hungarino loĝanta en la rumania urbo Cluj, konis/konas ĉiujn homojn de la rakonto vivintajn kaj vivantajn en la antaŭmilita kaj postmilita Rumanio. La rakontoj do ne estas fikcioj ! Tiuj homoj vere tiel malfeliĉis !

La verko ne estas artaĵo, sed tamen legindaĵo, kaj eĉ komencantaj praktikantoj de nia lingvo ĝin tre certe kapablos legi. Mi nur bedaŭras kelkajn erarojn korektendajn en postaj eldonoj.

E.L.

Por mendi librojn :



1. Vi sendas vian mendon

- per poŝte (la plej sekure) al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE (uzante la dorsflankan mendilon)

- per e-poŝto al «libroservo.efe@wanadoo.fr»

- nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.

2. Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj)

3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al «libroservo 2800-76 H NANCY» (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo «libroservo» sendita al la adreso de la libroservo.

Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al «LIBROSERVO» IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97 BIC :

PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo




Novajoj :



1. **1111 anekdotoj en esperanto**, Humuro, Jozef Borsky, *Espero.*, 112 p, 7,50 €. 1111 humuraĵetoj por agrabligi la etoson
2. **Taglibro de nenifaranto**, Poezio, Nicola Ruggiero, *Espero*, 72 p, 6,50 €, Poemoj de eks-prezidanto de la itala esperantista junularo. Demando, kies respondo troviĝas en la libro : ĉu la nenifaranto estas la kato ?
3. **Versoj de Persoj**, Poezio, Keyhan Sayadpour, *Espero*, 118 p, 6,00 €. "Kolekto de originalaj esperantaj poemoj verkitaj de iranaj esperantistoj"
4. **Fieraj koroj**, Studenta romano, Eduard Jitzovsky, *Espero*, 100 p, 6,00 €. Romano, kies agado disvolviĝas en Ĉeĥio, dum la 1930aj jaroj.
5. **Manlibro pri instruado de Esperanto**, Instrulibro, Opo, *ILEI*, 164 p, 8,70 €. Manlibro donanta konsilojn pri instruado de esperanto al junuloj : instrumentadoj, lernomaterialo, planado de la instruista laboro...
6. **Esperanto estas....**, Dvd Opo, *Espero*, 3,50 €. Filmo prezentanta esperanton : 6 partoj + fotoj, kromaj intervjuoj kaj koncertetoj,
7. **Kantoj por kursoj**, Kd-o, Stano Marček, *Stano Marček*, 12,00 €. 10 kantoj, aldone la teksto en PDF formato kaj la filmo Kukolo.
8. **Esperanto par la méthode directe**, Kd-o, Stano Marček, *Stano Marček*, 15,00 €. Prezento en formato PDF de la libroforma franclingva "rekta metodo" + modela prononcado.



Malnovaĵoj ĵus alvenintaj:



9. **Esperanto - Lingvo - literaturo - Mondo**, Movado, Pierre Janton, *U.E.A.*, 120 p, 6,00 €. Esperantlingva traduko de la prezento de esperanto en libro de la kolekto "Que sais je ?".
10. **Skizo de la esperanta literaturo**, Movado, Eduard V, Tvarozek, *Espero*, 92 p, 6,00 €. Listo de ĉefaj esperantlingvaj literaturaj verkistoj kun komentoj pri ties verkoj,
11. **111fabloj de Krilov**, Fabloj, Krilov, *H.E.A.*, 144 p, 2,50 €. Traduko de 111 fabloj de la rusa verkisto.
12. **Patrino koro**, Rakontaro, Nevena Nedelčeva, *Stafeto*, 136 p, 1,00 €. Kolekto de noveloj kaj poemoj de bulgara verkistino.
13. **Rakontoj el unua poŝo kaj rakontoj el la dua poŝo**, Rakontoj, Opo, *Ĉeĥa Esperanto Asocio*, 288 p, 6,00 €. 48 diversaj rakontoj.

Mendilo

Bonvolu sendi tiujn librojn:

-
-
-
-
-

al jena adreso:

S-ro/inu

-
-
-
-

En

la

Subskribo:

... ni prouu  rideti!...

Temo de disertajo proponita al studentoj pri filozofio :

« Elvoku plej koncize la tri sekvantajn kampojn, provante ligi ilin ...

1- religio, 2- sekseco, 3- mistero ».

Ricevis la plej altan poentaron la sekvanta teksto :

« Dio mia ... mi estas graveda ! Sed kiu kulpas ? ».



Iu patrino promenas kun sia fileto kaj trafas amikinin survoje. Ĉi-tiu estas aparte gracia ...

« Nu, Johaneto, bonvolu kisi la sinjorinon !

- Ne ...

- Etulo mia, estu obeema, la sinjorino estas afabla !

- Panjo, mi diris ne !

- Sed pro kio ci rifuzas dediĉi kiseton al la sinjorino ?

- Ĉar paĉjo provis hieraŭ dum nia promenado en la eta parko, kaj li ricevis vangofrapon ! ».

☆☆☆

Tri imitistoj deziras dungigi en teatro-spektaklon.

Antaŭ la fak-direktoro ĉiu elmontras sian kapablaĵon ...

« Mi, ekdiras la unua, kiam mi piediras rande de bov-paŝtejo, imitante blekon de vir-bovo, ĉiuj bovinoj alkuras kaj muĝas !

La dua fiere rivelas...

« Kiam mi bojas, ĉiuj katoj de la ĉirkaŭaĵo forfuĝas !

La dunganto, jam tre impresita, atendas proponon de la tria ...

« Nu, kiam sub nebularo mi kokerikas, aperas la suno ! ».



En trajno-kupeo, vojaĝanto kiu miskaptis la tagmezan manĝo-horon kaj ne havas kuraĝon por viziti la fak-butikon, alparolas knabon, kiu sidas fronte :

« Karuleto, ĉu ci konsentus helpi al mi ? Jen 10 eŭro, bonvolu iri al la butiko kaj aĉetu du sandviĉojn, unu por ci kaj la alia por mi ... ».

Iom poste la uleto revenas, mordante kun apetito en sandviĉon. Li redonas 5 eŭrojn al la petinto kaj klarigas :

« Mi bedaŭras, sed restis nur unu disponebla kaj temis pri la mia ! ».

En restoracio, gasto alvokas la kelneron

« Estimato, tiu steko similas al vera ŝuplando !

La kelnero, helpeme, diplomate sed voĉlaŭte ekkrias tra la plenplena salono...

« Ĉefo, iu kliento plendas, ke lia tranĉilo ribelas ! ».

☆☆☆

Du policistoj, deĵorante sur rapidvojejo, ekvidas veturilon, kiu provas strikte obeas la trafik-regularon.

Ĉar raras tia konduto, ili decidis gratuli la stiranton, kaj haltigas la aŭtomobilon iom pli malproksime ...

La viro ĉe la stirilo, iom heziteme tuj eldiras...

« Nu, eksciĉu, ke mian stir-legitimilon oni forprenis antaŭ du jaroj !... ».

Virino, verŝajne la edzino, kiu sidas apude, aldonas :

« Ne priatentu, sinjoroj, kiam li tro trinkis, li rakontas stultaĵon ! ».

Malantaŭa sidantino, eble iu bopatrino, duonvoĉe grumbletas ...

« Mi ja sciis, ke per ŝtelita veturilo oni ne povus longtempe itineri ! ».

Tiam, voĉo eliras el la багаĝ-kofro ...

« Ĉu ni jam trairis la landlimon ? »...



En apotekejo ...

« Bonan tagon sinjorino, mi deziras skatolon da acetilsalikilata acidotablojdoj ...

- Hem, vi certe aludas aspirinon ?

- Jes, tute prave ! La nomon mi malfacile enmemorigis ! ... ».

☆☆☆

Renkontiĝas du amikoj ...

« Imagu, mi viktimiĝis je neatendita hejmvizito. Rabisto eniris ja la domon post noktomezo, kaj intence, ne lumigis la koridoron ...

Bedaŭrinde mia edzino aŭdis bruon kaj silente alproksimiĝis, ŝvingante la tubon de polvo-suĉilo !...

- Ĉu li sukcesis forkuri ?

- Tute ne, la povrulo ! Li tuj ricevis viglajn fraĵojn ... Ŝi kredis, ke rehejmiĝis mi malfrue !



Tiun leteron ĵus ricevis lombardisto ...

Kara Sinjoro,

Mi havas la honoron konfirmi al vi ricevon de via letero, sendita la dek-duan de aprilo. La trian fojon, vi postulas de mi repagon de la mono, kiu vi ja pruntedonis al mi, kion mi do ja ŝuldas al vi.

Unue eksciĉu, ke mi tute ne kontestas tiun ŝuldon, kaj ke mi daŭre intencas plenumi la aluditajn repagon kiel eble plej rapide ...

Sed mi havas multe da aliaj kreditoroj, tiom respektindaj kiel vi, kaj tutsame postul-emaj, ankaŭ ilin mi intencas honorigi ...

Ĉar aktuale estas malfacile al mi kontentigi ĉiujn, inklude vin, je la fino de ĉiu monato mi ŝovas en ĉapelon ŝlipetojn, sur kiuj kuŝas la nomon de la kreditoroj, do ankaŭ la via, kaj poste mi hazarde eltiras la nomon de bonŝanculo, al kiu mi senprokraste pagas mian ŝuldon.

Mi aŭdacas esperi, ke, kial ne baldaŭ, aperos paperpeceto, sur kiu kuŝos via nomo. Intertempe, mi petas vin, estimata Sinjoro, akcepti miajn apartajn salutojn...

PS - Ĉar via lasta letero estas redaktita laŭ stilo nur tre supraĝe ĝentila, mi bedaŭras informi vin, ke la ŝlipeto kun via nomo sure, ne eniros la ĉapelon fine de ĉi-tiu monato, por enpartopreni la kutiman, hazardan eltraĵon.

Denove altestime al vi ...



Vespere, policano revenas hejmen pli frue ol kutime.

La edzino krias el la geedza lito:

« Karulo, ne saltu la lumon, mi havas kapdoloron !

La policano senvestiĝas, dum ŝi cerbumas, kiel eskapigi la viron kaŝitan sub lit-tuko.

Kiam la edzo proksimiĝas, ŝi ĝemas ... « Karulo, kiaj kapdoloroj ! Ĉu vi ne povus iri en apotekon por aĉeti tablojdojn ? ».

La edzo revestas sin en la mallumo kaj eliras.

Kiam li sonorigas ĉe la pordo de la apotekisto, kiu nokte deĵoras, tiu mirigas ! ...


« Kial vi tiamaniere okulumas al mi ? Ĉu vi ne rekonas min ?

- Jes, certe ! Vi estas Sro Jakobo, kiu prizorgas la trafikon en la apuda bulvarado.

- Nu, bone, sed ...

- Kial do, Sro Jakobo, vi nun surhavas fajrosoldatan uniformon ?

li certe ne komprenis!



... distra  angulo ...

1 – Nova "liter-enigmo"


				D	E			
	A	I	N	K		O	C	
	T		C				K	
C						T	I	
K	I						O	
	N	O						D
	D				K		E	
	C	K		N	O	A	D	
			T	I				

La bazo de tiu ludo, kiu elvokas la faman "sudoku" (neologismo !), inspirita de la "latina kvadrato ", konsistas el krado, kiun oni devas plenigi per 9-litera esperanta vorto (ĝi kuŝas tute "leg-*eb*la" en la unua linio), kies literoj, ĉiuj malsimilaj, devas troviĝi en ĉiuj horizontalaj linioj, en ĉiuj vertikalaj kolumnoj, kaj same en ĉiuj sub-kvadratoj 3 x 3.

Kelkaj literoj jam disponiĝas en la krado kaj sekve helpas por solvi la " problemon " .

(NB – Tiun liter-enigmon sendis speciale por "La Informilo " nia rumana samideanino Julia SIGMOND).

2 – Krucvort-enigmo



Ni denove ŝuldas ĉi tiun enigmon al nia kontribuanto Joël GRANDJEAN

HORIZONTALE

19. Eŭropa regn'.
20. Sporta defendant'.
21. Barba mamul'. Astr'.
22. Pasiva sufikso. Rilata al tagparto.
23. Vibranta ton'. Homa organ'.
24. Blovinstrument'.
25. Plenda ekkri'. Malfacile paŝanta.
26. Arbara bruna orkide'. Muzika son'.
27. Instrument' uzata por forigi la legomŝelon.
28. Fino de la pasiva prezenca participo. Tansigas en alian lokon.
29. Grava delikt'. Landkodo de Rumanio.
30. Buf. Numeralo.
31. INVERSE: Literonomo. Aprezus.
32. Dorsnaĝa insekto.
33. Femalo. Libr' en okonfolia formato.
34. Morfemo por rifuzi. INV: Antikva nom' de Irlando.
35. Sklavkomercist' pri afrikanoj.
36. Teksaj'. Person', kiu ludas rolon en teatro.

13. Aparat' pour mezuri temperaturon. Litera nomo. Sufikso.
14. Antikva bov'. Ligneca plant'. Korelativo. Brakparto. INV : Sufikso.
15. Sens'. Konjunkcio. Supera lernej'.
16. Alia manier' solvi problemon. Hom', kiu profesie baraktas en foiro.
17. Interne. Dent'. Ekfunkcio.
18. An' de eŭropa regn'. Astr. INV : INV : Unua virin'.

VERTIKALE

10. Azia regn'. Vort' konsistanta el la komencaj literoj de plurvorta nomo.
11. Elokventa parolant'. Herb' uzata por spici vinagron. Japana dram'.
12. Kurba ost'. Anastezia substanc'. Unu' de ŝipkapacito.

Solvoj de la lastaj enigmoj (153)


1/ - ŝmilblik – la milito, la arto mortigi grandskale, kaj fari kun gloro tion, kio farita etskale, kondukas al la pendumilo.

2/ - krucvort-enigmo

HORIZONTALE: 1. Esplorist. 2. Karoserio. 3. Spektakl. 4. Tem. Ek. Ip. 5. Erotika. 6. As. Apod. 7. Valparais. 8. Amait. Ole. 9. Gardil. Ok. 10. Armo. Et. 11. Omaĝul. 12. CD. Erofil. 13. Estas. Ba. 14. Akir. Cerb. 15. Kalorifer. 16. Ide. Be. Ju. 17. Londono. 18. Ejo. Scink.

VERTIKALE: 1. Ekstravaganc. Akile. 2. Sape. Samar. Dekadoj. 3. Preme. Larmo. Sileno. 4. Lok. Rapidometro. 5. Osteopati. Ara. Rbos. 6. Reaktor. Leĝoscienc. 7. Irk. Idao. Tuf. Ef. Oi. 8. Silik. Ilo. Librej. 9. To. Parseko. Labrusk.

... el nia fototeko ...



nepre vidinda !

Laù Bardhyl, nia elstara invitita preleganto, amindas la du plej junaj "staĝanoj" en Clefcy (ĝemeloj !) – Kiam du samlandaninoj renkontiĝas ! – Raraĵo ... la prezidanto de *Esperanto France-Est* gratulas la iaman prezidanton de la asocio pro lia naskiĝ-datreveno ! – Vere bongustas freŝaj "herboj" de Vogezoj aperitive preparitaj – Memorinda ekskurso ... malkovro de la fama sekojo de Clefcy : ĝia trunka cirkonferenco, je 1,30m el la grundo, mezuriĝas je 8,28 metroj ! Tio indas je ĉirkaŭdancado ! (vidu foton en la fak-raporto).